

Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

104-a jaro • n-ro 1245 (3) • Marto 2011

Danio, la ĉi-jara kongreslando



**Ni pioniras
simetriemon**

**Kongresa
komuniko 2**

**E-podkasto
de Pola Radio**

**Internacia
Universitato**

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL72INGB0000378964 BIC: INGB NL2A) 42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599 BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

51 ... Malferme: Ni pioniras la simetriemon (Probal Dasgupta)

52 ... Kongresa komuniko 2

53 ... Kongresa temo: Mojose en Kopenhago! Kun la junularo, en ĝia Internacia Jaro... (José Antonio Vergara)

54 ... 1247 E-podkasto de Pola Radio kaj...? (Gabi Kosiarska, Barbara Pietrzak)

55 ... Trejnseminario de TEJO kaj SEL maje 2011 en Varsovio

56 ... Internacia Universitato prosperas vintre kaj somere (Amri Wandel)

57 ... El nia historio: Semajno de Internacia Amikeco (Jean Amouroux)

58 ... Novajoj el la Esperantomuzeo: La komuna memoro de nia historio: fotoj en Interreto (Herbert Mayer)

59 ... Kalendaro 2011 – 2012

63 ... Recenzoj: Eugeno de Zilah pri *Saĝo kiel terapio*

64 ... Garbhan MacAoidh pri *La infana raso*

65 ... Laste aperis

66 ... Klerigu kaj kleriĝu! Nova ILEI-sekretario; Navige tra TTT-paĝoj (Marek Blahuš)

67 ... Oficiala informilo

68 ... Interlingvistika sesio kaj instruista trejnado en Poznań disvolviĝis en bona etoso (Ilona Koutny, Katalin Kováts)

69 ... Rotarianoj kaj la interkompreniĝo (RADE-teamo); Alispeca vojaĝo en Israelo (Amri Wandel)

70 ... Loke – fake – persone: Nederlando (Kees Ruig); Bulgario; Brazilo/Bel-Horizonto (Roberto Resende); Mozaiko; Dasgupta

KOVRILPAĜE: La kastelo Frederiksborg en Norda Selando en Danio estos celo de unu el la kongresaj aranĝoj dum la ekskursaj tagoj.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU, Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road, IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2484 8529; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa 38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h], ✉ +48 6000 51 425; ✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,

NL-2903 AC Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20; ✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ino Maritza Gutiérrez González, Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana; ☎ (of) +53 7 6489201, (h) +53 7 6498729; ✉ itzagutierrez@hotmail.com, mglez@enet.cu

Scienca kaj faka agado: Prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71799 Modiin, Israelo; ☎ +972 544 548712; ✉ amri@huji.ac.il.

Eksteraj rilatoj: S-ro Stefano Keller, Case postale 6034, CH-1002 Lausanne, Svislando; ☎ +41 76 261 06 09; ✉ kellerstefano@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Gregor Hinker. **Observanto de ILEI:** S-ro Stefan MacGill.

Ni pioniras la simetriemon

Nia movado laboras por la fortigo de specife tia internacia, interloka, intertipa amikeco, kiu insistas pri la demokratia duflankeco de la rilato. Ni ne diras, suben: "Vi estas mia amiko, ĉar mi faris personan kliniĝon por vin akcepti". Nek, supren, "Mi aŭdacas esti via amiko, ĉar vi gracie enpreni min en vian amikaron". Ni diras, vizaĝen: "Ni estas senhierarkie simetriemaj amikoj, kaj ni kune fosas diversajn komune homajn sulkojn. Jen nia aparta vivstilo. Kiamaniere ĝian revolucion simetriemon ni praktiku kaj prezentu ne nur en la prilingva sfero sed ankaŭ pli vaste?"

La sporto – kunpraktikata (ne nur junaĝe) kiel esprimilo de multaj amikecoj – estas areno videble egaliga. Multaj prave strebas ligi Esperanton al la sportistoj, kaj certe havas niajn bondezirojn. Sed troviĝas io sporta jam en la praktikado de Esperanto mem. Tion ni ofte elitisme malatentas, preferante emfazi aspirojn artajn kaj sciencajn. La tabeleco de nia tabelvorta lingvo invitas komencantojn kunsporti kun korifeoj, kiuj neniam rifuzas.

La internacian gastigadon kaj la memkonscian gastadon, ni esperantistoj ĉiugeneracie re- kaj relanĉas kiel unikan entreprenon. Ankaŭ ĝi, same kiel la sporto, estas universale fosata sulko. La esperantistado – ni ne faru la eraron ĉiam nomi ĝin eco – faras el la neŭtrala lingvo kulturan gastejon, kaj el la priEsperanta sinengaĝo konstantan elementon de feriecado eĉ en niaj plej feroce-sendorme strebaj tagnoktoj. Dum ni simetrie lernas la streĉojn kaj ĝojojn de la respondecaj gastado kaj gastigado, ni pionire fondas la planedan respublikon.

Laste, sed ĉu balaste?, ni venas al la artoj. Tre longe ankaŭ la Esperantaj artistoj restis metilernantoj en la atelieroj de la unulingvaj ŝtatoj, neneŭtrale iesaj,


radikismaj, al kiuj la gasta specio aspektas fakultativa kaj forsendebla. Sed hodiaŭ ni finfine fortu kuraĝe prediki al tiu grego.

Ni rajtu rakonti, kiamaniere nia magie ĉesa podio, surscenigante la militidajn realaĵojn de la ŝtatoj kaj kronoj de iesaj landoj, forsorĉas per nia arto iliajn pekojn kaj reliefigas ilian sportigan, gastigan kapablon. Ni proponu, ne tiom al interŝtataj instancoj la tujan uzon de nia lingvo, kiom al specifaj landoj tiun nian surscenigan magion, per kiu ankaŭ senEsperantaj homoj kaj institucioj lernos permagii el la glavoj kaj lancoj rikoltilojn kaj plugilojn.

Sporto, gastado, artoj – ĉie, estimataj legantoj, ni traktas pri intervizaĝeco. Sporte kaj gaste, ni funkcias inter specifaj unuopuloj, vidalvide. Arte, ni reliefigas la vizaĝojn, kiujn ni spertas dum nia vivado, per tiu aparta magio; ju pli malglavige ni surscenigas la vizaĝojn, des pli Esperanta estas nia podia sukceso. Se vi ne notas ĉi tie reklamon por mia 'projekto vizaĝoj', kara leganto, permesu al mi dubi pri via kapablo flari miajn publicajn intencojn.

Se ĉio ĉi estus dirata en la februara numero, vi pensus al la semajno de internacia amikeco. Dirate en la marta, la vortoj invitu vin al la kongresa temo. Kiel Johano la baptisto diris pri la savonto, mi nur balaas iom da tereno por la reĝisoro pri la kopenhaga temo. Se vi ne konas ĝian vortumon, mi ĝin ripetu: *dialogo kaj interkompreno*. Se vi havas nian trian virton¹ (post la espero kaj la obstino), vi atendos anoncojn pri la intencoj de tiu reĝisoro, kies sandalojn mi ne rajtas lavi. La estraro de la asocio sin distancigas de la neŭtrale kristanaj elvokoj de miaj vortoj, tamen notante, ke mi ne estas kristano kaj do povas neŭtrale fari tiajn aludojn sen tro da risko de miskompreno.

Probal Dasgupta



Einstein



Lapenna



Piron



Selten



Pelé



Coelho

Fotoj el la projekto "Vizaĝoj": <http://eo.wikipedia.org/wiki/Projekto:Vizaĝoj>

1) Aludo al la rekantaĵo de "La Vojo"



Kongresa komuniko 2

96-a Universala Kongreso de Esperanto Kopenhago, Danio, 23 – 30 julio 2011

Konstanta adreso: Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.
Retadreso: kongresoj@co.uea.org. TTT: [www.uea.org/
kongresoj/uk_2011.html](http://www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html).

Kongresa temo: La temo de la 96-a UK estas “Dialogo kaj interkompreno”. Kvankam ĝi rilatas al la Internacia Junulara Jaro, ĝi kompreneble povos esti traktata ankaŭ pli ĝenerale. Proponojn pri prelegoj aŭ alispecaj kontribuaj oni bv. sendi al la reĝisoro de la kongresa temo, d-ro José Antonio Vergara, joseantonio.vergara@gmail.com, kies asistanto pri specife junularaj aspektoj de la temo estos la juna pola aktivulo Pawel Fischer-Kotowski.

Kleriga Tago: Kleriga Tago: En lundo, la 25-a de julio, estos la naŭa Kleriga Tago. Proponoj pri partoprenigaj programeroj, podiaj diskutoj, laborgrupoj kiuj rilatas ekz. al la movado, lingvoj, informado, organizado, aŭ prelegoj pri nekutimaj temoj estas bonvenaj ĉe Claude Nourmont (2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgo; rete: moonmont@pt.lu).

Dua Bulteno: La Dua Bulteno estis dissendita al la aliĝintoj fine de februaro. Kun ĝi estis sendita konfirmilo pri la aliĝo al la UK kaj kongresa mendilo. La Dua Bulteno estas legebla ankaŭ en la kongresa retejo <http://uea.org/kongresoj/uk-2011.html>. Mendojn oni povas fari per la papera mendilo aŭ rete ĉe http://uea.org/kongresoj/uk_mendilo.html. Por uzi la retan mendilon necesas indiki siajn kongresnumeron, UEA-kodon kaj retadreson. Oni atentu, ke la limdato, ĝis kiam la mendoj atingu la Centran Oficejon, estas la 1-a de majo.

Vojaĝado: La oficiala flugalianco de la 96-a UK estas Star Alliance, reto de 27 flugkompanioj tra la mondo, kiu ofertas favorprezajn flugojn lige kun la kongreso. Por ricevi la specialan prezon bv. iri al la retpaĝo www.staralliance.com/conventionsplus, elekti “kongresanoj”, ĉe “login” skribi la eventan kodon SK10S11, elekti unu el la partoprenantaj flugkompanioj, elekti vian preferatan rezervoficejon kaj sciigi la eventan kodon, kiam vi rezervas la flugbiletonon.

Loĝado: Detalaj informoj troviĝas en la Dua Bulteno. Ĉi-jare la mendo de hotelo estas aparte simpligita: UEA ofertas 3 hotelojn kaj unu studentan loĝejon. La hoteloj havas grandan kapaciton kaj 2 el ili estas je promendistanco de la kongresejo. La Studenta Loĝejo estas trajne/metroo atingebla de/al la

kongresejo. La kvartalo de la kongresejo facile atingeblas de la urbo per metroo kaj busoj.

Ekskursoj: La Dua Bulteno proponas du antaŭkongresajn ekskursojn (al Danio kaj al Stokholmo, Svedio) kaj unu postkongresan ekskurson (al Oslo, Norvegio). La dumkongresaj ekskursoj montros la diversajn pejzaĝojn de Danio, kaj unu tuttaga ekskurso iros al Malmö, trans ponto, en Svedio.

Infana Kongreseto: Internacia Infana Kongreseto okazos, se oni atingos minimumon da partoprenantetoj. Pliaj informoj ĉe la retpaĝo <http://bertosch.free.fr/iik2011/index.html> kaj ĉe la komisiito Bert Schumann, infana.kongreseto@gmail.com.

IJK: La 67-a Internacia Junulara Kongreso (14-21 julio) okazos en Kievo, Ukrainio. Pliaj informoj ĉe: www.ijk-67.retejo.info/.

Reklamiloj: La Unua Bulteno riceveblas ĉe la Centra Oficejo. Glumarka folio kun 12 markoj mendeblas ĉe la Libroservo de UEA por € 0,90 (rabato de 1/3 ekde 3 folioj; aldoniĝas la sendokostoj kaj, en EU, imposto 19%).

Aliĝilo: Aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe la Centra Oficejo, kiu volonte liveros ĝin grandkvante por distribuado kun E-gazetoj kaj en E-aranĝoj. Ĝi estas elŝutebla en PDF-formato ĉe la kongresa TTT-ejo, kie eblas ankaŭ rete aliĝi al la UK.

Kotizoj: Ĝis la 31-a de marto validas jenaj kotizoj (interkrampe tiuj por la landoj de tarifo B): Individuaj Membroj de UEA (sed ne MG) € 200,00 (150,00); MG-membro aŭ ne-IM de UEA, € 250,00 (185,00); Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, IM de UEA, € 100,00 (75,00); Kunulo/junulo/handikapulo, ne-IM de UEA, € 150,00 (110,00). Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post la 31-a de decembro 1990 aliĝas senpage (bv. sendi kopion de dokumento kie klare aperas via naskiĝdato). Pri pagmanieroj vd. Jarlibron 2010 (p. 36-37) aŭ www.uea.org/kongresoj/uk_pagmanieroj.html.

Statistiko: Ĝis la 16-a de februaro estis registritaj 1032 kongresanoj el 57 landoj. Sur la unua loko estis Francio kun 139 aliĝintoj. Germanio (122) estis sur la dua loko, Japanio sur la tria (78) kaj Danio kun 73 aliĝintoj estis sur la kvara loko. Sekvis Pollando (62), Nederlando (53), Brazilo (41), Rusio (38), Svedio (34), Belgio (31), Hungario (27), Usono kaj Litovio (23), Brito kaj Italio (20), Finnlando, Norvegio kaj Svislando (19), Kroatio (16), Bulgario kaj Ĉeĥio (15).



Mojose en Kopenhago! Kun la junularo, en ĝia Internacia Jaro...

Je kioma aĝo vi, hazarda leganto, interesiĝis pri Esperanto kaj lernis ĝin?

Por granda parto el ni, tiu ĉi fascina afero trovis sian vojon al niaj respektivaj cerboj kaj koroj tre frue en la unuopaj vivitineroj, pli-malpli samepoke kiel la ekfloriĝo de aliaj intensaj emocioj, kiel amo kaj erotiko. Temas pri vivetapo dum kiu ĉiu homo, tra la malfacila procezo ne plu resti infano sed kreski, varme karesas en sia profunda interno esperojn por la estonteco, t.e. por la propra kaj foje eĉ por ĉies estonteco. Ĉu vi povas ankoraŭ memori aŭ eĉ denove senti la tiamajn ekscitiĝon kaj ĝojon, jen pro la beleco de la Zamenhofa revo, jen pro la ŝancoj senpere kontakti alilandajn homojn, jen pro la mirinda strukturo de la lingvo, kiu permesis al vi tiom rapide lerni?

Bonŝance, la vibranta energio, vasta imagopovo kaj krea iniciatemo de junaj homoj daŭre alvenantaj en ĉiu generacio signife pliriĉigis la vivon de Esperanto. Jes ja, ni pensu pri homo ankoraŭ ne 28-jaraĝa ĉe la publikigo de ĝia Unua Libro en 1887, aŭ pri la fondintoj de UEA en 1908 (Hector Hodler 21-jara, Edmond Privat 19-jara), aŭ pri la unua prezidanto de la iama Sovetrespublikara Esperantista Unio en 1921 (Ernst Drezen, 29-jara), inter centoj da similaj kazoj sur ĉiuj niveloj kaj sferoj de nia fenomeno. Ĉu nur pasinttempaj? Nu, hodiaŭ pensu ekz. pri la ĉefaj motoroj de E@I kaj lernu.net.

Tiu lasta ekzemplo permesas atenti la fakton ke en la nuna, rapide ŝanĝiĝanta mondo, Esperanto kerne bezonas siajn junulojn por pluvivantigi sin kaj adaptiĝi al la novaj kondiĉoj kiel kunlabora, eduka, socie engaĝiĝinta iniciato,

samkiel la homaro bezonas sian junularon por alfronti la diversajn defiojn kaj krizojn de la nuna realo (soci-ekonomiajn, ekologiajn, politikajn ktp), cele al nia komuna estonteco. Esperantujo kaj la mondo el kiu ĝi estas konscia ero, nepre kreu taŭgajn spacojn por vera, fruktodona kaj respekto plena dialogo inter la generacioj.

Ĝuste tial, la temon de la Kopenhaga UK konsistigos la Internacia Jaro de la Junularo: *Dialogo kaj interkompreniĝo*, lanĉita de UN por la periodo inter la 12-a de aŭgusto 2010 kaj la 11-a de aŭgusto 2011. Per tio UEA plian fojon daŭrigas sian persistan, respondecan subtenon al la regulaj alvokoj de Unesko aŭ la tuta UN-sistemo elstarigi kernajn aspektojn de la vivo de la homaro, gravajn por komune alstrebindaj celoj kiel paco, homaj rajtoj, daŭropova evoluo kaj interkultura solidareco.

Potenciale, la diskutado de tiel gravaj temoj, kadre de la plej granda E-evento, povus esti tre interesa kaj riĉiga, fakte modela kaj senprecedenca, se ni trafe profitus de la tute aparta trajto de nia lingvokomunumo esti tiom kulture kaj geografie diverseca. Ekz. ĉu per Esperanto iuj okcidenteŭropaj junuloj povus rekte informiĝi pri la malfacilaj vivkondiĉoj de siaj samgeneracianoj en subevoluintaj landoj? En postaj artikoloj mi (aŭ iu alia!) tuŝos la ĉefajn aksojn de la temaro.

Kiel ĉe ĉiu vivanta homkomunumo, la junularaj kulturo kaj lingvaĵo helpas movi la tutan aferon en Esperantujo. Tial mi invitas ĉiujn kontribui ekde nun, por ke okazu kiel eble plej *mojosa* (t.e. **modernjunstila**), instiga kaj utila dialogo inter la generacioj, pri la diversaj aspektoj de la junularo. Tio povas esti ŝanco por spirita rejniĝo...

José Antonio Vergara



1247 E-podkastoĵoj de Pola Radio kaj... ?

La 2-an de februaro la vasta komunumo de la E-aŭskultantoj de Pola Radio ricevis afliktan informon pri ne plu novaj E-elsendoj. La komunikita decido estis samtage afiŝita sur la muro de Amikaro de Pola Radio en Esperanto, kiu dum sia unujara ekzisto arigis en la socia portalo Facebook ĉ. 1115 membrojn.

La informo disvastiĝis fulmrapide, kaj sur la muro de la Amikaro kaj ekster ĝi komenciĝis vigla opiniinterŝanĝo pri tio, ĉu eblas kaj sub kiuj kondiĉoj, ke la teamo laboranta pri la E-programo de Pola Radio daŭrigu sian agadon en alia portalo, eĉ sen la nomo de tiu ĉi institucio.

Ne eblas kaŝi, ke en la lastaj jaroj ĝi kelkfoje sukcesis malagrabla surprizi per siaj decidoj la mondan esperantistaron. Ne eblas tamen kaŝi ankaŭ, ke kun la nomo de Pola Radio en la daŭro de preskaŭ 52 jaroj ligiĝas multaj belegaj momentoj en la historio de la E-komunumo. De tie dum tiu tuta tempo estis al la mondo komunikataj informoj pri E-eventoj, kongresoj, aktivajoj. De tie aŭdiĝadis la voĉoj de elstaraj esperantistoj, interparoloj, intervjuoj kun polaj kaj eksterlandaj agantoj de la E-movado. Altnivelaj elsendoj pri la pola literaturo en E-traduko kaj originala E-kreado atestis, ke la esperantistaro vaste dismetiĝinta tra la mondo formas veran socion, kiu ĝuas la ĉiutagan lingvan medion de la Varsoviaj E-elsendoj. Kaj formis ĝin krome temoj el la tuta programa oferto de la E-Redakcio de Pola Radio, kies origina celo estis proksimigi al la esperantlingva aŭskultanto Pollandon, ja proksiman al ĉiu esperantisto laŭ sia aktuala politika, ekonomia, scienca, kultura kaj turisma spektroj.

Estis periodoj kiam temis sole pri la duonhora – tamen ĉiutaga E-elsendo, estis periodoj kiam ĉiutage aŭdiĝadis kelkelsenda, eĉ trihora E-programo.

En la fino de 2006, post 48-jara ekzisto, la Redakcio de PR kaj la tuta E-komunumo spertis streĉajn kaj dramecajn semajnojn, kiam decidiĝis la estonteco de la E-lingvaj programoj el Varsovio. La tiama esperantista aktiviĝo superis ĉies atendojn, pri kio detale raportis la februara numero de *Esperanto* en 2007. Dank' al la vasta enlanda kaj

eksterlanda kampanjo la E-elsendoj – minacitaj de forigo – restis, kvankam ne en la formo de ĉiu el ni esperita.

Dum iom pli ol kvar jaroj la E-komunumo kutimiĝis al la nova formulo de la E-programoj de PR.

Senigitaj de la mallongonda kaj satelita emisiado, limigitaj al la reta ŝutabono, elkondukitaj el la strukturo de la Poreksterlanda Programo de Pola Radio, kie ilian lokon kaj pozicion prenis la Hebrea Redakcio, ili ja funkciis. Sciis pri ili bonege esperantistoj en la mondo, kiuj adaptiĝis al la sole reta emisiado, al reta aŭskultado, elŝutado. Al la ŝanĝoj tamen ne ĉiuj povis adaptiĝi. Multajn aŭskultantojn ni perdis. Ĉefe tiujn, kiuj aŭskultis nin per mallongaj ondoj aŭ per satelito, kaj kiuj trovis baron ne nur financan, sed ankaŭ psikan, aŭskulti la elsendojn per komputilo. Ĝenerale aŭskultantoj kun ĝojo akceptis la decidon pri daŭrigo de la E-lingvaj elsendoj de PR, kiuj, kvankam novstilaj, ne facile troveblaj per la oficiala retejo de Pola Radio, tamen multilate referencis al la plej bona tradicio kaj de la iamaj programoj. Baldaŭ montriĝis, ke en la interreta epoko la Varsovia E-programo senĉese logas novajn aŭskultantojn. Junajn, mezaĝajn, grizharaĝajn! Ilin ĉiujn karakterizis la sama trajto: la sopiro aŭdi la lingvon en la ĉiutaga uzo rilate al aferoj politikaj, sociaj, kulturaj kaj evidente movadaj.

En la Interreta Fako de Pola Radio la respondecon pri la novformulaj E-programoj transprenis Gabi Kosiarska. Sed ŝi ja ne solis, ĉar per ĉiutaga helpo, asisto, estis kun ŝi la malnovaj gekolegoj: Barbara Pietrzak kaj Maciek Jaskot. Dum kelka periodo kunlaboris Łukasz Żebrowski. Ĉiam helpoprete, eĉ se iom ombre, atendis Wojtek Usakiewicz. Tiu kunlaboro kun la tempofluo en ĉiam pli signifa grado ekhavis trajtojn de distanca laboro. (Daŭrigo dekstre.) ►



La malnova "antaŭpodkasta" teamo



La redakcia teamo, printempo 2003



La redakcia teamo en la somero 2006



Barbara Pietrzak kaj Gabi Kosiarska



La redaktisto Łukasz Żebrowski



La varsovia studio

Fotoj: Marek Blahuś, Harrilaine kaj arkivo de PR.



TEJO/SEL-Seminario Varsovio 2011

Trejnseminario de TEJO kaj SEL maje 2011 en Varsovio

Kadre de la kampanjo "SEL-Reaktivigo" Skolta Esperanto-Ligo kune kun TEJO organizas trejnseminaron por junaj aktivuloj kun la ĉefa temo: *Konstruante surbaze de diverseco – kiel ricevi la plejbonon el interorganiza junulara kunlaboro?*



La seminario okazos en Varsovio, Pollando, inter la 24-a kaj 30-a de majo 2011 (la 24-a kaj la 30-a estos la vojaĝtagoj).

La programo enhavas interaktivajn laborsesiojn pri teknikoj kaj metodoj de moderna laboro de junulaj asocioj kaj pri efikaj manieroj organizi junularon, uzante la temon diverseco kaj egalrajteco en internacia agado. La partoprenantoj lernos praktikajn metodojn de interkulturaj aktivuloj kaj la uzon de variaj iloj de la Konsilio de Eŭropo. Krome ili plibonigos siajn gvidadajn lertojn. Okazos vizito al la centra sidejo de ZHP (Pola Skolta Asocio) por diskuti pri spertoj en internacia kunlaboro kaj la potenciala uzado de la internacia lingvo. Krome oni vizitos la lokan grupon de esperantistoj.

Ni invitas junajn aktivulojn en la skolta movado kaj esperantistojn kiuj simpatias kun la skolta movado. La ĉefa kriterio estas klara intereso pri la temo diverseco kaj egalrajteco en internacia kunlaboro kaj ebla kontribuo al la programo. Danke al subvencio de la Eŭropa Junulara Fonduso ni povas inviti 30 partoprenantojn, pagante la restadkostojn kaj kontribuante al la vojaĝkosto. La aliĝkoto estas nur 70 eŭroj (por eŭropanoj) aŭ 100

eŭroj (por ne-eŭropanoj) por la 5-taga programo. Pro la limigita nombro de lokoj ni devos elekti partoprenantojn uzante kriteriojn sur la aliĝilo, kiuj certigas la ekvilibron de nacieco kaj sekso, kaj la eblan kontribuon al la programo. La limdato por aliĝi estas la 15-a de marto 2011. Frua aliĝo estas rekomendata. Pliaj informoj inkluzive de la programo, la kriterioj kaj la aliĝilo haveblas ĉe: www.esperanto.org/skolta aŭ ĉe la Organiza Teamo: SEL.Reaktivigo@gmail.com. Se vi konas skoltojn en via urbo, tio estus granda oportuno por prezenti Esperanton kaj inviti lokajn skoltojn por partopreni la trejnseminaron. Al tiuj, kiuj deziras aliĝi, ni proponos Esperanto-fulmkurson (retan/per Skajpo), por provizi ilin per la bazaj Esperanto-komprencapabloj kaj ebligi senperan komunikadon.

► La Interreta Fako de PR neniam aparte interesiĝis pri sia E-podkasto, sed malgraŭ modestaj financaj kondiĉoj la E-sekcio funkciis sen grandaj obstakloj, bedaŭrinde ne tre longe. Nome post la ŝanĝo de la direktoraro administranta la Informadikan Fakon de PR komenciĝis programlimigoj en la E-elsendoj.

La unuaj surprizis la tutan E-komunumon antaŭtage de la Jubilea UK en Bjalistoko, kiam per arbitra decido estis forigitaj la semajnfinaj programoj. Dumsemajne aŭdiĝis ekde tiam nur kvin elsendoj. Sekvaj limigoj okazis fine de majo 2010. Tiam Gabi ricevis apartajn taskojn en la Informadika Fako, ligitajn kun la alifarado de la portalo de PR. La E-elsendoj ne estis ĉesigitaj, sed ili estis limigitaj ĝis tri premieroj semajne kun la premiso, ke ili konsistu sole el ripetataj eroj. Tio estis rekte vegeta stato

rilate al la atendoj de la aŭskultantoj, kio emfaziĝis en iliaj leteroj kaj ankaŭ estis klare vortumita dum diversaj personaj renkontiĝoj kun la aŭskultantoj, inkluzive de AERA-kunveno dum la Havana UK. Do postkongrese ni komencis singarde revenigi elementojn de la originala programenhavo. Tio estis ĉesigita per decido de la 2-a de februaro 2011. Ĝis tiam entute la aŭskultantoj de la E-elsendoj en Pola Radio ricevis 1247 programojn, elŝuteblajn el la radiopaĝoj aŭ riceveblajn ŝutabone.

Kiam ni skribas ĉi tiujn vortojn, estas neniu pli ajn decidoj. La situacio ne aŭguras renverson. Restas la konscio pri tio, kiom multe la E-komunumo dankŝuldas al Pola Radio, kvankam la nunaj radioaŭtoritatoj en Pollando ne volas agnoski kiom multe ili rofitas de siaj E-programoj, pro kiuj la nomo

de PR fariĝis rekonebla marko pri fidindaj informoj el kaj pri Pollando en la landoj, kiujn la iama kaj la aktuala programpropono de PR ne atingas.

Kvankam ne aŭdiĝis definitivaj decidoj pri la estonteco de la E-sekcio en la Informadika Fako de PR, al la redakciaj adresoj venas ĉiam pli da petoj, insistoj, ke la ĝisnuna ĵurnalista teamo en Varsovio ne rezignu, sed eĉ sen la ŝildo de publika institucio daŭrigu sian laboron por la bono de la E-Komunumo.

Se la kondiĉoj necesaj por tio estos por tio trovitaj, nia teamo estas preta, kun malnovaj/novaj kolegoj tian provon entrepreni. La baza demando estas, ĉu la E-komunumo daŭre bezonas oferton, ĝis nun disponigatan de la E-Redakcio, sekve la E-fako de Pola Radio.

**Gabi Kosiarska,
Barbara Pietrzak**

Internacia Universitato prosperas vintre kaj somere



Amri Wandel, Floreal Gabalda kaj Dieter Quednau

Jam la kvaran jaron sinsekve okazis en la Internacia Festivalo en Germanio la Internacia Vintra Universitato (IVU), sed laste kun duoble pli da prelegoj ol en la antaŭaj fojoj, preskaŭ samnombre kiel en la Internacia Kongresa Universitato (IKU), kiu nun estas en la procezo de prijuĝado de la proponoj por la UK.

Kvankam la lasta rikolto de IKU-proponoj estis iom malpli abunda laŭkvante (18 anstataŭ proksimume tridek en la lastaj jaroj), ĝi estas tre altnivela kaj varia laŭteme, kio starigas malfacilan taskon antaŭ la IKU-komisiono, sed promesas riĉan oferton en Kopenhago.

"Somera Universitato" unuafoje okazis en la 17-a UK en Genevo en 1925, laŭ instigo de Edmond Privat. La serio de sciencaj prelegoj en UK fariĝis Internacia Somera Universitato (ISU). La nomon oni ŝanĝis al "Internacia Kongresa Universitato" en 1981, kiam la UK unuafoje okazis en la suda hemisfero, en Brazilo. Ekde la UK en Tampere, 1995, IKU kunlaboras kun Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), tiel ke inter la naŭ IKU-prelegoj tri estas efektive daŭrigataj kiel AIS-kursoj.

Se okazas Somera Universitato en la UK, kial ne estu Vintra Universitato, ekzemple en la jarfinaj Esperantorenkontiĝoj? En 2007 mi iniciatis la Internacian Vintran Universitaton (IVU), kadre de la 24-a Internacia Festivalo (IF) en Düsseldorf. La formato estis simila al IKU: studsesio de AIS konsistanta el tri kursoj. La aŭspicio de la du bone konataj

institucioj – science AIS kaj organize IF – ebligis al la nova aranĝo fariĝi tradicia vintra kursaro, same kiel IKU somere. Kiel dirite, ĉi-jare la prelegoj abundis, duoble ol antaŭe, atingante preskaŭ la nombron de IKU-prelegoj. Dum la tri pasintaj IVU-sesioj havis po tri kursojn kaj 5-6 prelegojn, la ĉi-jara sesio konsistis el sep kursoj kaj 12 prelegoj. Tiu kvanto proksimume IVU al la amplekso de ĝia pli aĝa parenco – IKU – kiu kutime havas naŭ prelegojn (el kiuj tri estas AIS-kursoj kun po tri prelegoj, do entute 15 prelegoj). Kvankam la plimulto de la IVU-kursoj ĉi-jaraj temis pri lingvoj (la IF-ĉeftemo), ili estis sufiĉe variaj. Mi prelegis pri la evoluo de astronomio – de Genezo tra Koperniko ĝis Einstein kaj Hubble. Daniel Moirand faris literaturan kurson pri Aleksandro Dumas. Ugo de Riu prelegis pri geografio: "Longitudo – de Stonehenge ĝis GPS". Kristin Tytgat provokis la aŭskultantojn per la demando "Ĉu la nederlanda estas monda lingvo?" kaj Tatjana Loskutova prelegis pri "Lingva diverseco kaj lingva politiko en Rusio". Ankaŭ la du ceteraj kursoj temis pri lingvo: Tacuo Huĝimoto prelegis pri "Idiolekto, dialekto, idiomo", kaj verŝajne la plej populara preleganto, Josef Ŝemer, lerte prezentis kaj instruetis

la hebrean lingvon. En tri el la sep kursoj okazis finekzamenoj, kaj la sukcesintoj ricevis oficialajn AIS-atestojn en solena ceremonio dum la silvestra balo, okazanta en la lastaj minutoj de la jaro 2010, en la ĉeesto de AIS-senatano Prof. H.D. Quednau.

La temoj de la ĉi-jaraj IKU-proponoj inkluzivas Esperantologion, etnologion, biologion, ekonomikon, fizikon, lingvojn, astronomion, historion, filozofion, medicinon, kemion kaj ekologiojn. Ankaŭ la proponintoj estas inter la plej elstaraj fakuloj en la movado kaj eĉ ekster ĝi. Fine, ĉi-jare senprecedence alta nombro de IKU-proponoj prezentas ankaŭ AIS-kurson: dum en antaŭaj jaroj estis inter 2-4 AIS-proponoj, ĉi-jare estas ok. Tial ankaŭ nun la IKU-komisiono kaj la estraro de UEA havas tre malfacilan taskon, elekti la naŭ prelegojn kaj tri kursojn inter duobla nombro da altnivelaj proponoj. La rezultoj aperos fine de aprilo en la IKU-retpaĝo de UEA: <http://uea.org/dokumentoj/IKU>. La rigora prijuĝa procedo aplikata al la proponitaj prelegoj far la IKU-komisiono garantias sciencajn karakteron, zorge elektitajn temojn kaj altan nivelon de la prelegoj. Profitas la kongresanoj, kiuj povas sperti profesiajn prelegojn, aŭskulti bonan lingvaĵon kaj lerni pri variaj temoj, ofte komplikaj aŭ ne facile atingeblaj por laika publiko. Dum interne de la movado IKU kaj lastatempe ankaŭ IVU popularigas profesiajn kaj sciencajn temojn, al la ekstero ili demonstras ke scienca esploro kaj altnivela edukado povas esti farataj per Esperanto. IKU produktas ĉiun jaron kolekton de la prelegoj en skriba formo, la IKU-libron, kiu servas kiel presita kaj reta dokumento, ebligas formale informi pri la scienca kaj alt-edukada aplikoj de Esperanto, kaj prezenti Esperanton en scienc-rilataj internaciaj forumoj – Unesko kaj Neregistaraj Organizaĵoj kiel Internacia Asocio de Universitatoj.

Pliaj informoj pri IKU aperas en la artikolo "Du jardekoj de Internacia Kongresa Universitato" en la festlibro de Tonkin.

Amri Wandel

estrarano pri Scienca kaj Faka Agado kaj sekretario de la IKU-komisiono

Semajno de Internacia Amikeco

En 1874, la 9-an de oktobro, estis fondita en Berno "Universala Poŝta Unuiĝo" (UPU), al kiu aliĝas preskaŭ ĉiuj memstaraj landoj. En 1957 estis decidite en Otavo saluti ĉiujare la kulturan fakton, ke ĉiu homo troviĝanta ie ajn en la mondo, kie ekzistas perpoŝta eblo por interrilati, povas ricevi respondon de homo troviĝanta ankaŭ ie ajn en la mondo.

En ligo kun Esperanto la lando, kiu oficiale konkretigis la rekomendon, estas Pollando, kaj en la 1960-aj jaroj abundis polaj poŝtaj stampoj kun la teksto en Esperanto: "Internacia semajno de korespondado". Presita slogano sur eldonitaj kovertoj krome diris, dulingve: "Se ricevo de letero faras al vi plezuron, skribu ankaŭ vi".

Surbaze de tiu ĉi ideo Erik Carlén (1908-1986) sugestis enkarnigi la internan ideon de esperantismo dum Semajno, kies gvidmotivo estos: "Amikeco trans limoj".

Stariĝis internacia komitato, kiu ligis landajn kaj lokajn komitatojn kun la celo informi ĵurnalistojn, oficialulojn, la publikon, instigi unuopulojn intersaluti sin ekzemple per poŝtkartoj plej ofte eldonitaj tiucele kaj tiel plu.

La Semajno, kies simbolo estis du sinpremantaj manoj sub la slogano, okazis unuan fojon de la 16-a ĝis la 22-a de februaro 1969. Poste ĝi datiĝis senvarie ĉiun lastan planan semajnon de februaro.

Tiel naskiĝis "Semajno de Internacia Amikeco" (SIA). Iom post iom SIA iĝis tradicio de nia kulturo pli kaj pli enradikiĝanta precipe de kiam speciala kunveno de la 54-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko (1969) agnoskis la eventon.



leterpapiro kaj skribilo en la mano!

Tamen, por multaj el ni ne mortis la SIA. La grupo kiu kutime plej solenas ĝin, estas la belga "Esperanto 3000" el Loveno.

La 28-an de februaro 2004, kadre de SIA, la grupo festis 25 jarojn de sia ekzisto. Tiukaze la urbestro

Tiam Erik Carlén estis vicprezidanto de UEA kaj du pliaj svedoj, s-ino Sandgren kaj s-ro K. Gustafsson, alportis sian ŝtonon al la konstruo.

Kiam mi rimarkis, ke la CO de UEA komencis uzi, eksterevente por oficejaj bezonoj, restantajn poŝtkartojn, kiujn ĝi eldonis jarojn antaŭe por disvendo cele al SIA, mi komprenis, ke io ŝanĝiĝis.


Fakte tiel ŝanĝiĝis la interhomaj komunikiloj, ke por nuntempaj generacioj estas apenaŭ imageble, ke homo sidu ĉe skribotablo kun

de Loveno subskribis oficialan deklaron kaj invitis la urbestrojn de la kvar ĝemelaj urboj fari same. La lasta paragrafo de lia deklaro tekstas jene: "Mi, L. Tobbyack, urbestro de la urbo Loveno, per ĉi tio nun deklaras la semajnon de la 22-a ĝis la 28-a de februaro 2004 Semajnon de Internacia Amikeco en la urbo Loveno. Tio ĉi kongruas kun la mondvasta kampanjo sub aŭspicioj de la Universala Esperanto-Komunumo, kies celo estas transponti la fendon en la komunikado kaj la reciproka kompreno de la popoloj".

Rapide evoluas la komunikaj teknologioj kaj pravas Barbara Pietrzak: "En la interreta epoko oni ne plu amaskvante utiligas tradiciajn poŝtkartojn kun la slogano de la Semajno kun du interpremiĝantaj

manoj, sed eble ekde nun la Interreto kaj ĝiaj sociaj portaloj en Esperanto kaj en aliaj naciaj lingvoj devus kaj povus esti pli intense utiligataj por viviĝi kaj memori tiun pli ol 40-jaran tradicion de la Esperanto-komunumo". (Revuo *Esperanto* de februaro 2011.)

Jean Amoureux



En la retejo de UEA troviĝas nun subpaĝo pri la Semajno de Internacia Amikeco, www.uea.org/informado/sia.html.

La komuna memoro de nia historio: fotoj en Interreto

Tute nerimarkite de la esperantistaro kreiĝis en la lastaj jaroj la plej granda datumbanko kun Esperanto-bildoj en la interreto: En "Bildarchiv Austria" (Bildarkivo Aŭstria, BA) troviĝas 11 000 fotoj kaj aliaj bildobjektoj kun Esperantaj temoj.

BA apartenas al la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj estas unu el la plej grandaj interretaj bild-datumbankoj en Eŭropo. Ekde 2006 la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo enigas siajn fotojn kaj muzeajn objektojn en tiun datumbankon. Pro tio estas videblaj plej diversaj aferoj rilatantaj Esperanton, ekz. monumentoj, insignoj, medaloj, statuoj, poŝtaĵoj.

Tiuj 11 000 fotoj atestas la historion de Esperanto, kiu baldaŭ havos 125 jarojn. Ili kvazaŭ savas por nia memoro gravajn eventojn el la pasinteco kaj ofte pli intense kaj pli rekte peras informojn kaj impresojn ol skribaj fontoj. La esperantistoj certe aprezos vojaĝi tra la tempo ekde la komenco de nia lingvo ĝis la hodiaŭa tempo.



La rusa Esperanto-pioniro Innokentij Serišev en Pekino, 1924

La impona fotomaterialo saviĝis, ĉar ekde la fondo de la Esperantomuzeo en 1927 multaj esperantistoj sendis siajn fotojn kaj tiel savis ilin de pere. Per la utiligo de modernaj teknologioj ili nun estas je la dispono de ĉiu esperantisto. Kaj ankoraŭ alian avantaĝon havas tiu procedo: la fotoj restas bone protektataj en la arkivo, tamen oni povas rigardi ilin senkoste en la interreto, ĉar ili estas ĉiuj skanitaj.

Tute nova estas speciale facila aliro al tiuj bilddokumentoj pere de la tiel nomata "Digitale Sammlung Esperanto" ("bitigita kolekto Esperanto"), kiu prezentas la bildelementojn laŭtempe kaj laŭteme. Eblas agrabla vojaĝo tra la tempo laŭ diversaj temoj. Ekzistas 9 ĉeftemoj:

- **aranĝoj** (*Veranstaltungen*)
- **privataj kaj oficialaj organizoj** (*Private und öffentliche Einrichtungen*)
- **trafikejoj, monumentoj, publikeco** (*Verkehrsflächen, Denkmäler, öffentliche Präsenz*)
- **personoj** (*Personen*)
- **kulturo** (*Kultur*)
- **objektoj** (*Objekte*)
- **ekonomio** (*Wirtschaft*)
- **aliaj planlingvoj** (*Andere Plansprachen*)
- **pordo al la mondo** (*Tor zur Welt*)

Post elekto de temo eblas la serĉado tra la tempo. Skribante al la Kolekto por Planlingvoj oni ricevas folion, kiu enhavas klarigojn pri serĉ-strategioj kaj la tradukon de la plej gravaj serĉvortoj.

Herbert Mayer



Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la julia-aŭgusta numero.

marĉo:

02-06: Bibliaj Tagoj en Werl ĉe Dortmund, Germanio. Prelegoj pri la *Biblio* kaj diservoj kun *Adoru*, la ekumena preĝ- kaj kantlibro. ✪ Stefan Lepping, Mellinstr. 5, DE-59457 Werl, Germanio.

03: Internacia Karnavala Parado en Rijeka, Kroatio. Eblas aliĝi al Esperanta karnavala grupo kiel partoprenonto aŭ spektanto. ✉ Esperanto-Societo Rijeka, Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, Kroatio. ✪ www.esperanto-rijeka.hr; esperanto.rijeka@ri.htnet.hr.

05-10: 17-a Korusa Staĝo en Esperanto kun folkmuzikaj interŝanĝoj en Camon (Arjejo - Ariège), piede de Pireneoj, en la kampadejo "La Pibola", proksime al Mirepoix, Francio. ✉ Jorgos, FR-11420 Lafage, Francio. ☎ +33/0-468 605 417. ✪ tutpeko@aliceadsl.fr.

12-13: Vintraj Tagoj en Tampere, Finnlando. ✪ eafprezidanto@esperanto.fi aŭ eafsekretario@esperanto.fi.

12-14: Junulara Esperanto-Renkontiĝo en Velem, Hungario. Semajnfina internacia renkontiĝo en pitoreska arbara loko, tuj apud Aŭstrio. Ekskursoj, kantoj, babiloj, ludoj. ✉ Hungara Esperanto-Junularo, MIESZ, Kárpát u. 33. HU-1133 Budapest, Hungario. ✪ www.ijs.hu; hej@ijs.hu.

18-20: Veganisma Semajnfino en Antverpeno, Belgio. En pluraj lingvoj, inter kiuj Esperanto. Kun veganismaj kuirlecioj. ✪ Lode Van de Velde, lodchjo@yahoo.com.



18-20: Studosemajnfino en Schoonloo, Nederlando, por ĉiu aĝo en ĉiu nivelo. ✪ Esperanto Nederland, www.esperanto-nederland.nl/ned/index.php; studosemajnfino@esperanto-nederland.nl.

19: Esperanta Sabato en Vannes, Francio. Venu esperantumi gramatike, lude, teatre kaj gimnastike! ✉ Esperanto-Vannes, 20 place Fareham, FR-56000 Vannes, Francio. ✪ esperanto.vannes@hotmail.fr.

25-27: 2-a MEVO, Marborda Evento printempa en Mošćenička Draga, Kroatio (norda Adriatiko). Bonfartiga amika kunestado, kontraŭkriza! En la nobleca Riviero de Opatija, promenoj,

amuzvesperoj, konversaciaj horoj, klerigaj programoj, vojaĝprezentoj. ✉ ORBIS PICTUS de Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste, Italio. ☎ +39 040 767 875, ☎ +39 327 98 300 86 (IT); +385 99 50 11 912 (HR). ✪ www.ipernity.com/home/orbis;orbispictus@iol.it.

25-29: Kvara Mezorianta Turisma Kunveno "Esperanto sur la Silka Vojo" en Karaj (Karaĝo), Irano. Renkonti samideanojn el diversaj landoj en la meza oriento, turismumi, interkonatiĝi, pridiskuti gravajn kaj interesajn temojn. ✪ www.arabujo.org/mk/2011/novajxoj.php?l=eo.

aprilo:

01-03: La 6-a Sabla Printempo en Milevsko, Ĉeĥio. Tradukado de ĉiĉeronaĵoj kaj geografiaj (vikipediaj kaj retejaj) tekstoj. ✪ pisek@esperanto.cz.

01-03: 69-a regiona staĝo de Esperanto en Ban/Meurthe Clefcy, Francio. Staĝo kun prelegoj de Bardhyl Selimi el Albanio, planto-kolektado kaj konversacia kurso. Distra vespero kun FAMO. ✉ Esperanto-France-Est, Simone Cajelot, 4 route de la Beurée, FR-88230 Fraize, Francio. ✪ <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>; simone.cajelot@sfr.fr aŭ andreo.ag09@sfr.fr.

01-03: 2-a Esperanta 'Humurino' en Odeso, Ukrainio. Renkontiĝo por esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Partopreno en la Urba Karnavalo, ekskurso, koncerto kaj pikniko. ✉ Odesa E-klubo "Blanka Akacio", ✪ <http://humurino.inf.ua>; viktor.alder@gmail.com.



04-08: Lingva seminario en Nilvange, Francio. Plialtigi la lingvonivelon de la partoprenantoj kaj konatiĝi ilin kun la belega regiono de Loreno apud Luksemburgo. ✪ www.esperanto-thionville.ass0.fr; esperanto-thionville@laposte.net; bruno.henry.esperanto@gmail.com.

07-09: 12-a Israela Esperanto-Kongreso kun sekva 5-taga turisma postkongreso tra Israelo kaj Jordanio. ✉ ELL, P.O.K. 22041, IL-61220 Tel Aviv, Israelo. ✪ eli@esperanto.org.il.

08-10: 92-a Brita Kongreso de Esperanto en Eastbourne, Britio. Kongresa temo: "Lumturoj, lumuloj kaj lumuloj". ✉ Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road,

Barlston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, Britio. ✪ www.skotlando.org/brita-kongreso-esperanta-versio/la-brita-kongreso-de-esperanto-2011/pri-la-kongreso/; ivor@impax.org.uk.

11-15: Praktika staĝo pri ekologia ĝardenumado kaj preparado al la scienc-teĥnika branĉo de la kapableco, en Kvinpetalo. ✉ Kvinpetalo, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. ☎ 33 (0) 549 034 314. ✪ <http://kvinpetalo.org/spip.php?rubrique5;informoj@kvinpetalo.org>.

11-16: Lingva seminario en Skokovy. Aranĝo de Asocio de Esperantistaj Handikapitoj, sed ne nur por handikapitoj. ✪ nechvilep@seznam.cz.



14-16 kaj 23-24: Festa Renkonto Internacia de Geknaboj "FRINGOJ" por infanoj kaj gejunuloj 8/17-jaraj, E-lernantoj kaj iliaj instruistoj. ✉ Kulturdomo de Esperanto, Château de Grésillon, FR-49150 St. Martin d'Arcé, Francio. ✪ <http://gresillon.org/spip.php?article23>; kastelo@gresillon.org; eliz.barbay@wanadoo.fr.

15-29: Flugkaravano al Ĉinio lige al Internacia Esperanto-Konferenco en Wuhan pri la temo "La ĉina saĝo". Ŝanhajo - Wuhan - pejzaĝo ĉirkaŭ la rivero Li - Honkongo. ✪ chrdle@kava-pech.cz.

16: Esperanta Sabato en Vannes, Francio. Venu esperantumi gramatike, lude, teatre kaj gimnastike! ✉ Esperanto-Vannes, 20 place Fareham, FR-56000 Vannes, Francio. ✪ esperanto.vannes@hotmail.fr.

18-23: IEK 11, Internacia Esperanto-Konferenco en Wuhan, Ĉinio. Kun antaŭkonferenco en Pekino. La traktota temo: "La ĉina saĝo". ✪ <http://osiek.org/index.php>. OSIEK kasisto@osiek.org.

20-26: Internacia Junulara Festivalo en Pornassio, Liguria, Italio. La tradicia paska festivalo de Itala E-Junularo, en ĉarmega vilaĝo en la norditala ĉemara regiono. ✉ Itala Esperantista Junularo, Gioventù Esperantista Italiana, via Villoresi 38, IT-20143 Milano, Italio. ✪ iej@esperanto.it.

22-26: Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo en Seto, Francio. Kunorganizita de SAT-Amikaro, Espéranto-France kaj pluraj societoj. ✉ LOKO, 13bis rue Haute, FR-30310

Vergèze, Francio. ✉ info@esperantosete2011.fr, <http://esperantosete2011.fr>.

22-29: Printempa Semajno Internacia (PSI) en la klerigejo Maria Rosenberg, Waldfischbach-Burgalben, Germanio. La paska aranĝo por la tuta familio. ✉ www.esperanto.de/psi, psi@esperanto.de.

29 apr-01 maj: 5-a BRES, Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj Spiritistoj en Braziljo, Brazilo. Spiritisma evento tute en Esperanto, kies temo estas: "Spiritisto, amu kaj instru vin!" ✉ BAES (Brazila Asocio de Esperantistoj Spiritistoj), ✉ esperantospiritismo4@gmail.com.

29 apr-09 maj: 23-a Aroma Jalto en Jalto, Ukrainio. E-festivalo kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de la partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la belega naturo de Krimeo. ✉ Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kiev, Ukrainio. ✉ www.aromajalto.ukrainio.org.ua, volodomir@ukr.net.

30 apr-07 maj: 32-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Nowy Sącz, Pollando. La temo: "Civitana aktiveco de esperantistoj." ✉ Ĉefa estraro de PEA, Aleja Wolności 37 F 7, PL-33-300 Nowy Sącz, Pollando. ✉ www.esperanto.pl, korlando@o2.pl.

30 apr-08 maj: Printempaj intensaj kursoj kun ILEL, finiĝantaj per KER-ekzamenoj en Bauge, Francio. Kurso 1: "Elanu... saltu!" gvidata de Christophe Chazarein, por esprimi sin en bona Esperanto (A2-B1). Kurso 2: "Verve pri verboj" gvidata de Stefan MacGill, por progresintoj, kursgvidantoj kaj kursgvidantoj (B1-B2). Internaciaj KER-ekzamenoj de UEA/ITK B1, B2 kaj C1. ✉ (vidu 14 apr). ✉ <http://gresillon.org/spip.php?rubrique20>; kastelo@gresillon.org.

majo:

07-08: Internaciaj KER-ekzamenoj de UEA/ITK sur la niveloj B1, B2 kaj C1 en Grezjono, Francio. ✉ (vidu 14 apr).

07-14: Kongreso de esperantistaj fervojistoj, la 63-a kongreso de IFEF, en la ĉeĥa urbo Liberec. ✉ www.ifef.wz.cz, ladislav.kovar@tiscali.cz.

13-15: Sveda jarkongreso en Stockholm, Svedio. Jarkongreso de Sveda E-Federacio kun prelegoj, diskutoj kaj jarkunvenoj. ✉ Sveda Esperanto-Federacio, Vikingagatan 24, SE-113 42 Stockholm, Svedio. ✉ www.esperanto.se, sefkongr2011@esperanto.se.

13-15: 7-a Iberia Renkontiĝo en Katalunio, en la regiono de Ĝirono, Hispanio, kun subteno kaj kunlaboro de hispanaj kaj portugalaĵ esperantistoj. ✉ <http://esperanto.cat/ir2011/>, info@esperanto.cat.

14: 34-a Malferma Tago de la Centra Oficejo en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj pri Erasmo (Vera Barandovská-Frank kaj Gerrit Berveling), filmoj, prezento de libroj k.a. En la libroservo ĉio rabatita. ✉ (vidu sur la p. 62).

14-15: 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar, Kroatio, omaĝe al la 100-jariĝo

de la aperigo de la unua libroforma traduko el la kroata literaturo en Esperanto. ✉ Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio. ✉ www.ipernity.com/home/kroata.kongreso; lk.bjelovar@gmail.com.

14-15: Printempa amikeca renkontiĝo Esperanta en Ruse, Bulgario. Aranĝo dediĉita al 1330 jaroj de la bulgara ŝtato. Kun ekskurso al la urboj Pliska kaj Preslav. ✉ Urba Esperanto-societo "Libero", ul. Pliska 36, BG-7000 Ruse, Bulgario. ✉ libero_ruse@yahoo.com.

20-22: Printempa Esperanto-Kunveno (PEKo) en Mozet apud Namur, Belgio. Semajnfina renkontiĝo. Ampleksa programo kun du koncertoj (JoMo kaj valona muziko), ekskursoj, E-kursoj, prelegoj. ✉ Asocio Por Esperanto, rue de Velaine, 114 bte 4, BE-5060 Sambreville, Belgio. ✉ doumontvalere@yahoo.fr.

21-23: 8-a MEKARO – Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto en Kingston, Ontario, Kanado. Turisma amikeca semajnfino, vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ✉ Esperanto-Klubo de Kingstono kun Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8. ✉ www.esperanto.qc.ca, informo@esperanto.qc.ca.

24-30: Skolta trejnseminario de SEL kaj TEJO en Varsovio, Pollando. Seminario por junaj aktivuloj kun la temo: "Konstruante surbaze de diverseco – kiel ricevi la plejbonon el interorganiza junulara kunlaboro?" La partoprenantoj lernos praktikajn metodojn de interkulturaj aktivaj kaj la uzon de variaj iloj de la Konsilio de Europo. ✉ www.esperanto.org/skolta; SEL.Reaktivigo@gmail.com.

junio:

01-05: Printempa BARO 2011 en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. ✉ www.krokodilo.de/baro/baro.php, andim@gmx.li.

02-05: Staĝo en Kvinpetalo: Vigligo de regiona Esperanto-agado kaj ĝenerala membrokunveno de Esperanto Poitou-Charentes. ✉ (vidu 11 apr).

03-07: 25-a Kongreso de italaĵ katolikaj esperantistoj en Santa Giustina, Belluno, Italio. Temo: "Ni atendas novan ĉielon kaj novan teron". Religia kaj kultura programo, ekskursoj. ✉ Itala Katolika Unuiĝo Esperantista. ✉ www.ueci.it; katolika.sento@ueci.it.

04: Inaŭguro de nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo Svitavy, Ĉeĥio, pri la temo "Esperanto kaj spiritaĵo tradicio de la mondo", kadre de "Muzea nokto". ✉ www.muzeum.esperanto.cz/cs;dvor.libuse@seznam.cz.



10-12: Solenajo omaĝe al la centjariĝo de la Esperanto-klubo en Olomouc, Ĉeĥio. ✉ dudajanol@centrum.cz.

10-17: Esperanto-kurso kun antaŭekskurso en Naantali, Tampere kaj Heinävesi en Finnlando. Tradicia kursosemajno en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ĉiuj kursoniveloj, kursoj el la tuta mondo. Instruistoj Atilio Orellana Rojas kaj Patrik Austin, kursogvidanto Tiina Oittinen. ✉ Esperanto-Asocio de Finnlando. ✉ <http://esperanto.fi>; eaf@esperanto.fi.

11-16: Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado en Karlovo, Bulgario. Internacia seminario kun sciencaj kaj fakaj prelegoj ligitaj kun profesia agado de la partoprenantoj. ✉ Bojidar Stefanov Leonov, pk 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario. ☎ +359-88-5056469. ✉ www.ipernity.com/blog/32119/227259; leonov@rozabg.com.



17-20: Landkongreso de Esperanto-USA en Emeryville, Kalifornio (apud San Francisco). ✉ www.esperanto-usa.org/en/node/2039;lkus2011@esperanto.org.

19: Tradicia renkontiĝo (jam de 75 jaroj!) de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio, sur la ĉeĥa-pola landlimo. ✉ suchanekj@seznam.cz.

24-26: Renkontiĝo okaze de la Tago de la kuracaj plantoj en Monaĥejo "Sankta Profeto Ilija" (inter la urboj Mezdra kaj Roman) en Bulgario. Prelegoj pri kuracplantoj, popolokredoj kaj kutimoj, pri la utiligo de kuracplantoj. Sankta Meso kun la Episkopo de Vraca. ✉ Esperanto-societo "Sukceso", p.k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario. ✉ sukceso@bitex.bg.

25: 17-a Esperanto-Tago en Pardubice, Ĉeĥio. ☎ +420-466-611-941. ✉ aeh-ikeh@volny.cz.

25 jun-03 jul: Grandpolia Esperanto-Somero en Wagrowiec, Pollando. Kultur-politika aranĝo kun sesio de EDE-Federacio, studado, ekskursoj, kantado ĉe fajro kaj diskutado. ✉ Centro de Esperanta Kulturo, ul. Kosciuszki 49, PL-62-100 Wagrowiec, Pollando. ✉ fr.witucki@gmail.pl.

28 jun-02 jul: 70-a Hispana Kongreso 2011 en San Lorenzo de El Escorial, Hispanio, organizata de Hispana Esperanto-Federacio. ✉ Hispana Esperanto-Federacio kaj Madrida Esperanto-Liceo. ✉ www.esperanto.es; info@esperanto.es.

29 jun-05jul: 1-a Internacia Esperanto-Semajno, IES-1 en la ĉefurbo Erevano kaj arbara ripozejo Tsakhkadzor, Armenio. Venu kaj malkovru la antikvan Armenion kaj la biblian monton Ararato. ✉ www.area.am (aranĝoj); ies-1.armenio@area.am, susanna.baghdasaryan@yahoo.com.

julio:

03-10: Internacia Junulara Lingvotendaro, IJL en Jászberény, Hungario. Matene lernado, posttag-

meze ekskursoj kaj plaĝumado. ✉ hferenc@pr.hu.

03-13: Renkontiĝo de Amikoj – RA ĉe la maro en Tarhankut, Krimeo, Ukrainio. Venu por ĝui la tempon inter esperantistoj ĉe la Nigra Maro, lerni Esperanton kaj sportumi. ✉ Katerina Arbekova, a/ja 107, RU-630078 Novosibirsk, Rusio. ✉ www.ra.nsk.ru; katka8@ngs.ru.

03-16: 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. 1-a etapo apud la Vranov-lago. ✉ www.set-lancov.cz; podhradska@volny.cz.

05-09: Staĝo en Kvinpetalo: Esperanto kaj Turismo. ✉ (vidu 11 apr).

09-14: 8-a TAKE, Tutamerika Kongreso de Esperanto en São Paulo, Brazilo. Samtempe kaj samloke 46-a Brazilo Kongreso de Esperanto kaj 31-a Kongreso de Brazilo Esperantista Junulara Organizo, BEJK. ✉ www.easp.org.br/kongreso_sudastelaro@gmail.com.

09-16: 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-47) en Priekulji (Ĉesu distrikto). Temo: "Folkloro dum jarcentoj". ✉ Latvia Esperanto-Asocio, Margarita Želve. ☎ +371 26407174. ✉ www.esperanto.lv; margarita.zelve@gmail.com.



09-17: Jubilea kongreso de Aŭstralio Esperanto-Asocio en Adelajdo. Temo: "100 jaroj de Esperanto en Aŭstralio. Kaj nun?" Prelegoj: H. Tonkin, T. Steele kaj aliaj. Koncerto de JoMo, teatra kaj kanta konkursoj, ekskursoj. ✉ Katja Steele, 143 Caulfield Ave, Clarence Gardens SA 5039, Aŭstralio. ✉ <http://aea2011kongreso.ning.com>; www.sa.esperanto.org.au.

11-16: Somera Esperantokurso en Lesjöfors, Svedio. Infangrupo kaj 3 niveloj por plenkreskuloj. 6 horoj da instruado ĉiutage kun spertaj internaciaj instruantoj. ✉ Esperanto-Domo, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. ✉ www.algonet.se/~egarden/; egarden@esperanto.se.

12-16: Internacia natur-amika renkontiĝo: Miraklo de duno kaj aer-miraĝo en la Suda Gobio, Mongolio. Renkontiĝo en la suda parto de Mongolio, por ekkoni la viv-kutimojn de kamelbredistoj kaj ĉevalistoj. ✉ Batzaya, P. O. Box 57, MN-10646 Ulaanbaatar, Mongolio. ✉ batzaya@rambler.ru.

14-21: 67-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Kievo, Ukrainio. ✉ Ukraina Ligo de Esperantista Junularo kaj TEJO, Mikaelo Lineckij. ☎ +38 (044) 2231255, ☎ +38 (063) 8493193. ✉ www.ijk-67.retejo.info/; ijk-67@ukr.net.



14-21: Kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) en Olomouc, Ĉeĥio. ✉ priborsky@brailnet.cz.

16-23: Seminario pri alternativaj ideoj kun prelegoj kaj diskutoj (verduloj, ekologio, energifontoj, kuracmetodoj...). Intensa E-kurso en Grezijono, Francio. ✉ (vidu 14 apr).



17-23: 44-a ILEI-Konferenco en Kopenhago, Danio. Temo: "Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado". ✉ www.ilei.info/agado/Kopenhago2011.php.

17-30: 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio, apud la Vranov-lago. 2-a etapo. ✉ (vidu 03 jul).

18-23: Staĝo en Kvinpetalo: Praktikado de la lingvo. Komencantoj kaj 2a-grada nivelo. ✉ (vidu 11 apr).

18-23: Hamburga Somero 2011 en Hamburg, Germanio. Internacia renkontiĝo "survoje al Kopenhago". Temo: "Hamburgo – mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo 2011". ✉ Ralph Glomp, Wandsbeker Chaussee 185b, DE-22089 Hamburg, Germanio. ✉ www.esperanto-hamburg.de/hoso_somero@esperanto-hamburg.de.

22-30: Postkongreso de IJK-67 kaj la 16-a Velura Sezono en Jalta, Ukrainio. ✉ www.velura.net; jefim_z@mail.ru.



23-30: 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, Danio. ✉ (vidu sur la p. 52).

23-30: Alternativa semajno en Grezijono, Francio (praktika ekologio, vegetarismo, verda turismo, naturismo, toleremo...). E-kursoj matene. Vegetaraj manĝoj. ✉ (vidu 14 apr).

23-30: 42-a IJK, Internacia Infana-junulara Kongreseto kun la temo "Vikingoj", en Hundested, Danio. Infanoj kaj adoleskaj junuloj amuziĝas en la feriejo "Gallebjerggård" apud la maro, norde de Kopenhago, dum iliaj gepatroj ĝuas la UK-on. ✉ Bert Schumann, 9 rue Couradin, FR-35510 Cesson-Sevigné, Francio. ✉ <http://bertosch.free.fr/ijk2011/>; infana.kongreseto@gmail.com.


29-31: Segmaŝino-2011 apud Perm, Rusio. Esperanto-tendaro ĉe "Segmaŝino", konata internacia civitana forumo apud la urbo Perm, Rusio. ✉ Esperanto-klubo de Perm, p.k. 1227, RU-614105 Perm, Rusio. ✉ perm@rusio.info.

30 jul-06 aŭg: Kursoj de franca lingvo kaj Esperanto matene, ekskurso al Luar-kasteloj

posttagmeze, kulturaj vesperoj. En Grezijono, Francio. ✉ (vidu 14 apr).

30 jul-06 aŭg: 4-a INA-Konferenco en Herzberg am Harz, Germanio. La signifo de naturkuracado en la nuna mondo. Prelegoj pri naturkuracado, praktikaj spertoj. ✉ Internacia Naturkuraca Asocio (INA), Harald Schicke, Hauptstr. 38, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. ✉ info@ginseng-laden.de; www.ina-asocio.info.

30 jul-06 aŭg: 84-a SAT-Kongreso en Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino. ✉ 84-a SAT-Kongreso, Kralja Tvrtka 19, BA-71000 Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino. ☎/☎ +387-33-205487. ✉ www.satesperanto.org; satkongreso@esperanto.ba.



30 jul-06 aŭg: Somera Esperanto-Studado, SES 2011. 4-a renkontiĝo de la lernantoj de lernu.net en la urbo Nitra, Slovakio, 90 km de Bratislava. Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, vespere amuzado. ✉ Peter Baláz, Vifážná 840/67-A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. ✉ http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/2011/index.php; esperanto666@gmail.com. Filmo pri SES 2010: www.youtube.com/watch?v=5vga6pwgU6s.

31 jul-13 aŭg: 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio, apud la Vranov-lago. 3-a etapo. ✉ (vidu 03 jul).

aŭgusto:

01-06: 12-a MIRO, Mirinda Internacia Renkontiĝo en Stara Sušica, Kroatio, en mezepoka kastelo. ✉ KEJA (Kroatia Esperanto-junulara Asocio), ✉ keja.hem@gmail.com.

01-07: Milan Zvara – esperantista turista pied-marŝo en Ukrainio, Zakarpata provinco. Ĝi komenciĝos de la vilaĝo Dovhe, kie naskiĝis Milan Zvara. La lasta punkto de la itinero estas Hoverla, la plej alta monto de Ukrainio (2061 m s. m.n.). ✉ Volodimir Hordijenko, p/k35, UA-01133 Kijiv-13, Ukrainio. ✉ volodimir@ukr.net.

02-09: 61-a Kongreso de Kristana Esperanto-Ligo, KELI, en Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ cea.polnicky@quick.cz.

06-14: Amika Rondo en Nijnij Tagil, Rusio, dediĉita al la urbaj tagoj, kun ekskursoj, amuzaj lecionoj ktp. ✉ Larisa Kuzmenko, ✉ www.k9698.narod.ru; klarisa8@yandex.ru.

08-15: FESTO en la Grezijono-Kastelo, Francio. Junulara renkontiĝo organizata de internacia teamo. Vinilkosmo disponebligis koncertojn dum la tuta semajno, en neforgesbla etoso kun densa vespera programo. Tage ekskursoj kun prelegoj. **15-24: Post-FESTO:** Festa semajno por infanoj, junuloj kaj familioj. Artaj aktivadoj, sporto, ludoj kaj E-kurso. ✉ alekcxjo@gmail.com; com.kajbjokac@gmail.com.

09-13: **Staĝo en Kvinpetalo:** Altnivela tradukado kun Brian Moon. ✉ (vidu 11 apr).

12-14: **Renkontiĝo** de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov, Ĉeĥio. ✉ podhradska@volny.cz.

13-20: **15-aj internaciaj pluezekaj renkontiĝoj** en Pluezec. Francio. Kursoj, atelieroj, dancoj, prelegoj, turismado, vesperumoj ktp. ✉ Pluezec-Esperanto, 5 hent toul broch, FR-22470 Pluezec, Francio. ✉ pluezek@gmail.com.

15-19: **51-a Somera Festivalo** - Kunludo kaj kunstudu en Barlastono, Britio. Du-nivela kursaro kun la eblo turismi aŭ private studi/ esplori en la Biblioteko Butler. ✉ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DTST12 9DE, Britio. ☎ +44-(0)1782-372141. ✉ eab@esperanto-gb.org.

15-21: **21-a KISO** en Marburg (Germanio): "Ludi, krei, sperti vin mem". ✉ Gunter Neue, Marburga Esperanto-Grupo, Afföllerstr. 19, DE-35039 Marburg/Lahn, Germanio. ✉ kiso@esperanto.de.



16-24: **Staĝo en Kvinpetalo:** Biblioteka ordigado kaj Muzika Staĝo. ✉ (vidu 11 apr).

20-27: **Itala Kongreso** en Torino, Italio. La temo: "Kaj nun ni estu Eŭropanoj!" ✉ <http://italakongreso.esperantoitalia.it>; itala.kongreso@gmail.com. Videoj: Torino, pasia urbo: <http://vimeo.com/14586979>. Torino, historia urbo: <http://vimeo.com/14587971>.

22-30: **20-a MELA - Memzorga Lagumado** en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbaniĝi. ☎ Laca +36-30-2097864, Andi: +36-30-2752068.

septembro:

02-04: **4-a Somera Universitato** kaj renkontiĝo de la aktivuloj kaj simpatiantoj de EDE kaj de iliaj familioj en kastelo Grezijono, Francio. ✉ (vidu 14 apr). ☎ +46 707675455. ✉ www.e-d-e.org/Somera-Universitato-en-kastelo?lang=eo.



05-09: **Lerna semajno** de Tuluzaj Esperantistaj Fervojistoj apud Tuluzo, Francio. Tri niveloj, manĝoj kaj tranoktoj surloke. ✉ Tuluzaj Esperantistaj Fervojistoj, 44 Rue de Marseillan, FR-31240 L'Union, France. ✉ http://tef-esperanto.over-blog.com/pages/Stage_2011-3963346.html; andmir@wanadoo.fr.

11: **10-a Spiritisma Esperanto-Renkontiĝo** en Rio de Janeiro, Brazilo. ✉ Esperanto Grupo Lazaro Luiz Zamenhof, Rua Abilio dos Santos 137, Bento

Ribeiro, BR-21331-290 Rio de Janeiro, Brazilo. ✉ contato@lazaroluizammenhof.com.br.

11-18: **EKOTUR 11.** Tradicia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj en Dobřichovice (itineraj en Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy), Ĉeĥio. ✉ www.kava-pech.cz/trip-ekotur2011-esperanto.html; chrdle@kava-pech.cz.

oktobro:

01-08: **19-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo** en Malgrat de Mar, Barcelona, Hispanio. ✉ Luis Serrano Pérez, Apartado 423, ES-08200 Sabadell (Barcelona), Hispanio. ☎ (+34)93 7275021. ✉ http://personales.ya.com/semajno;luis_serrano@ya.com aŭ luis_serrano@mixmail.com.

07-09: **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio** en la urbo Šumperk, Ĉeĥio. ✉ www.esperanto.cz/Tomecek@esperanto.cz.



07-09: **Komuna Esperanto-Kongreso** de Japanio kaj Koreio apud Seulo en Koreio. La temo "Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro". ✉ http://jei.or.jp/evento/2011/kk_jek11s@jei.or.jp.

10-14: **Staĝo en Kvinpetalo:** Malkovri la Esperantan literaturon. ✉ (vidu 11 apr).

20-23: **Rusia Esperantista Kongreso**, REK-27 en Ĉeboksari, Rusio. ✉ www.reu.ru/index.php?evento=REK-27;kongreso@reu.ru.

20-23: **Internacia Lingva Festivalo 2011** en Ĉeboksari, Rusio. Tradicia aranĝo organizata de esperantistoj por neesperantistoj kaj traktanta lingvajn temojn. ✉ www.lingvafestivalo.org; al.blinov@gmail.com.

21-23: **'Course-You-Can'**, Barlastono, Britio. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencantoj / komencintoj (okazos samtempe kun 'Drondo' - spertuloj kunvenigu nespertulojn!). ✉ (vidu 18 apr).

21-23: **'Drondo'**, Barlastono, Britio. Semajnfina Esperant-lingva diskutrondo pri diversaj temoj (okazos samtempe kun 'Course-You-Can' - spertuloj kunvenigu nespertulojn!). ✉ (18 apr).

25-29: **Staĝo en Kvinpetalo:** Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrioj. ✉ (vidu 11 apr).

26-30: **Vikimania** en Svitavy, Ĉeĥio. Unika internacia renkontiĝo de E-vikipediistoj kaj interesigantoj pri Vikipedio. ✉ Pavla Dvořáková kaj E@I, Gregorova 2653, CZ-39701 Písek, Ĉeĥio. ✉ evikimania@gmail.com.

januaro:

08: **E-gården-Jarkunveno** en Lesjöfors, Svedio, je la 14-a. Ankaŭ diskuto pri planoj por la estonteco de



la domo. ✉ Esperanto-Gården, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. ✉ www.esperanto.se;egardenlfs@gmail.com.

09-12: **7-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado** en Iksan, Suda Koreio. Esperantista Asocio de Ŭonbulismo okazigas renkontiĝon kun diversaj programeroj, en kiu oni povas praktiki meditado, fari komunan ekskurson al vizitindaj lokoj, spertikoreankulturon, ekkoni Ŭonbulismon. ✉ Esperantista Asocio de Ŭonbulismo, Koreio. ✉ www.uonbulismo.net;esperanto@saluton.net.

13-15: **'Ni festivalu!'** kaj **'Drondo'**. Semajnfina aranĝo en Barlastono, Britio. Staĝo pri Esperanta teatro kaj diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj. ✉ (vidu 8 apr 2011).

aprilo:

27 apr-01 maj: **Krokodila Renkontiĝo 2012** en Arrout, Francio. Kvar tagoj da umado en Pirinea montara vilaĝo. ✉ Christophe Chazarein, 98 rue Riquet, FR-31000 Toulouse, Francio. ✉ <http://krokodila2012.wordpress.com>; krokodila2012@gmail.com.

majo:

16-20: **Printempa BARO 2012** en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ (vidu 01 jun 2011).

19-21: **9-a MEKARO - Mez-Kanada Renkontiĝo** de Esperanto en Kebeko, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ✉ Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8. ✉ informo@esperanto.qc.ca.

julio:

97-a **Universala Kongreso de Esperanto** en Hanojo, Vjetnamio.

Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy, Ĉeĥio. Tutsemajna aranĝo kies temo estos "Sciencfikcia literaturo kaj robotoj".

Mapo de E-aranĝoj troviĝas ĉe:
www.Esperantoland.org

Aktuala listo de konataj E-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe:
www.eventoj.hu

Malmulte da fojno en tiu ĉi trogo

Saĝo kiel terapio – Išmintis kaip terapija. Jūratė Baranova. Trad. Gediminas Degėsys. Vilnius, Litovio: Trys Žvaigždutės, 2008. 341p. 18cm. ISBN 9789955641759. Prezo: € 10,50

Jūratė Baranova estas profesoro pri filozofio ĉe la Pedagogia Universitato en Vilnius. Inter la jaroj 2000 kaj 2007 ŝi publikigis ses librojn kies esperantigitaj titoloj komprenigas ŝian interesokampon. Jen ili: *Filozofio de historio*, *Etiko – filozofio kiel praktiko*, *Morala filozofio de la 20a jarcento – interparolo kun Kant*, *Meditoj: tekstoj kaj bildoj*, *Filozofio kaj literaturo: kontraŭdiroj, paraleloj, kruciĝoj*, *Nietzsche kaj postmodernismo*. Profesoro Baranova interesiĝas pri la praktika efiko de la filozofio. Ŝi esperas, kiel jam esperis epikuranoj kaj stoikuloj, ke "filozofo estas kuracisto de la animo" (p. 87). Tiele, ni komprenas la iom misgvidan titolon de ŝia libro: *Saĝo kiel terapio*. Misgvida, ĉar la aŭtoro laŭlonge de tiu ĉi libro parolas pri tio, kion oni kutime nomas "filozofio". Ŝi, cetere, ne konfuzas saĝon kun filozofio, ŝi eĉ citas Platonon: "Kaj filozofo – diras Diotima – troviĝas en la mezo inter saĝuloj kaj stultuloj" (p. 28). Veras, aliflanke, ke, en *Saĝo kiel terapio*, ŝi serĉadas la doktrinojn havantajn psikologiajn kuracefikojn nur ĉe antaŭkristanismaj filozofoj, kaj ĉe tiuj ĉi la konfuzo inter *sophia* kaj *philosophia*, "saĝo" kaj "saĝemo", estis kutima. Filozofio vere disiĝas de la saĝo, tio estas, ke filozofoj ĉesas esti saĝuloj, nur post Kartezio, en la 17-a jarcento.

Jūratė Baranova provas do trovi "praktikan saĝon" en filozofiaj doktrinoj. Ŝia libro dividiĝas en du partojn: "Antikva etiko" kaj "Orienta etiko". La unua parto, "Antikva etiko", entenas ses ĉapitrojn, kies titoloj fidele anoncas la temojn: 1. Saĝo kaj povo: Trasimaĥo; 2. Saĝo kiel transcenda idealo: Sokrato; 3. Saĝo kiel akrevido de la vero: Platono; 4. Praktika (*phronesis*) kaj teoria (*sophia*) saĝoj: Aristotelo; 5. Saĝo kiel ataraksio: Epikuro; 6. Saĝo kiel apatio: stoikistoj.

Mi ne scias kion signifas la litova esprimo *tiesos išvalga*, sed temante pri Platono, la titolo de la ĉapitro I.3 devus esti "Saĝo kiel kontemplado de la vero: Platono", "akrevido", laŭ Zamenhofs uzado, ne taŭgas en la kunteksto. La terminoj "transcenda", "ataraksio" kaj "apatio" estas en PIV, ni nur atentu la filozofian sencon de "apatio". La enhavo de la ĉapitroj estas bonaloja universitata produktaĵo, tia kian ni trovas en multaj libretoj franclingvaj kaj germanlingvaj por kandidatoj al universitataj enirekzamenoj. Mi ne diras tion ĉi malestime, ĉar tiajn librojn, ĝis la recenzata, mi ne renkontis en nia lingvo. Ĝi bezonatis probable ankaŭ en la litova kaj ebligas akiri kelkajn



bazajn konojn pri la antikva etiko. Pleje plaĉis al mi la sesa ĉapitro, la plej longa. Ĝi min instigis al relego de *Leteroj al Lukilio* ("Lucilio" en la teksto), esenca fonto de tiu ĉi ĉapitro. Sed ve, mi havas en mia libraro nur kvar el la 124 leteroj de Seneko al Lukilio, do mi ne povis pritaksi la ĝustecon de la senekaj citaĵoj tradukitaj senpere el la litova *Laiškai Lucilijui* kaj ne el la latina *Ad Lucilium epistolarum moralium libri XX*, kiel postulus la kutima universitata metodo. Tion mi bedaŭras, ĉar troviĝas en tiu ĉi sesa ĉapitro vera antologieto, 79 citaĵoj sur 26 paĝoj, el *Leteroj al Lukilio*. Kelkaj el ili estas korĝojigaj, ekzemple: "filozofio, proponante sin mem al ĉiuj kvazaŭ stratulino, estas damaĝa" (p. 86); sed ĉu precize tion diris Seneko en la latina, mi ne scias. Tiu antologieto estas certe leginda eĉ por tiuj kiuj jam akiris mezlernejajn konojn pri la eŭropa filozofio. Ĉio kion diras profesoro Baranova pri Sokrato, Platono, Aristotelo, Epikuro kaj Seneko, estas aŭdinda. Sed post Platono kaj Aristotelo, kial ŝi ne parolis pri Plotino kaj pri la novplatonismo? La novplatonismo, sintezo originala de platonismo akademia kaj aristotelismo licea, estis, laŭ ĉiuj filozofi-historiistoj, unu el la plej gravaj pensofluo de la romia imperio. Plotino mem estis konscienco-direktanto same kiel Seneko. La mistikismo de Plotino havis pli da praktikaj efikoj ĉe imperiestro Galieno, ol la stoikismo de Seneko ĉe imperiestro Nerono. Kial do la stranga silento pri li, en libro kies celo estas trovi tekstojn pri resanigo de malsanaj animoj? Kial profesoro Baranova silentas ankaŭ pri cinikuloj: ili ja ĉiuj estis "animodirektantoj"?

Pri la dua parto, "Orienta etiko", ne utilas multe paroli. Jam en la enkonduko profesoro Baranova konfesas sian distancon de la "orienta" filozofio: "Kio estas komuna inter litova kaj orientaj kulturoj? Doniĝas la respondo: nenio." (p. 105) La longaj citaĵoj el Hegel pri ĉinoj, sen kunteksto, ŝajnas rasismaj, kalumnijaj kaj... stultaj. Pri tio ĉi ankaŭ la aŭtoro konsentas. Kial do enmeti ilin en libron tute aliteman? Kial paroli pri Erich Fromm, kiu estas psikanalizo kaj neniel specialisto pri "orienta" filozofio, se tio estas por diri, ke "E. Fromm ankaŭ komparas zenbudhismon kun la psikanalizo de S. Freud. Kaj li rimarkas gravajn diferencojn inter ili" (p. 107). Ĉu iu iam supozis, ke ne ekzistas "gravaj diferencoj" inter psikanalizo kaj zeno? Se oni vere volas paroli pri E. Fromm en libro en kiu temas pri "orienta etiko", kial ne eliri el la dialektiko inter "esto" kaj "havo", pri kiu Fromm tiel multe insistas? Kial Shankara kaj la vedanta-a etiko ne havas ĉapitreton inter, aŭ post, la ĉapitroj "Konfuceca etiko", "Taoisma etiko", "Budhismo" kaj "Zenbudhismo"? Ĉu pro siaj multaj similecoj kun la novplatonisma etiko jam evitata en la unua parto?

Tio kio estas dirita en la dua parto de la libro troviĝas ankaŭ en iu ajn enciklopedio. Tamen estus multo direnda.

Ĉiujn ĉapitrojn sekvas, laŭ universitataj kutimoj, bibliografio, kiun la tradukinto baptis "literaturo", verŝajne pro la altiro de la litova vorto *literatūra*. Cetere, enhavtabelo, bibliografioj kaj piednotoj okupas 48 paĝojn el la 175 paĝoj de la libro. Plibeliaj ilustraĵoj (fotoj nigra-blankaj pri famaj pentraĵoj kaj statuoj) okupas pliajn 11 paĝojn. Leganto de la Esperanta unua duono de tiu ĉi dulingva libro legos do 116 paĝojn. Kion ni povas ekscii el la ekstertekstaj paĝoj? Nu, tion, ke profesoro Baranova legas en la litova, angla, rusa kaj pola. Francaj kaj germanaj aŭtoroj estas citataj el siaj anglaj tradukaĵoj. Profesoro Baranova verŝajne scipovas, kiel ĉiuj universitataj instruistoj pri filozofio, ankaŭ la latinan kaj la helenan, sed tialingvaj verkoj ne estas menciitaj en la bibliografioj kaj piednotoj. Mi miras pri la malmulteco de originalaj tekstoj uzitaj de la aŭtoro. Krom la jam menciita libro de Seneko, mi trovis unu libron de Ksenofono (kiu ne estas saĝulo nek filozofo), unu de Aristotelo, unu de Popper kaj unu de Cicero, ĉiuj en litovaj

tradukaĵoj. En la bibliografio pri la dua parto, nur la libro de Konfucio (Konfucijus. *Apmąstymai ir pašnesiajai*) estas originala teksto. La aliaj libroj estas verkaĵoj de universitatuloj pri filozofoj aŭ pri aliaj universitatuloj. Esperanta azeno trovas malmulte da fojno en tiu ĉi trogo.

La tradukaĵo de Gediminas Degėsys estas komprenebla. Tamen la tradukinto ne konas la filozofian lingvaĵon jam ekzistantan (ekzemple, li tradukas la platonan *Tò sympósion*, per "Festeno", anstataŭ la jam tradicia "Simpozio" ktp.) kaj transskribas fremdajn vortojn senpere el la litova ("Kungdzi" anstataŭ "Kongzi", "jen" anstataŭ "jen" ktp.). Neprus utiliĝi en tiaj tradukaĵoj la transskribistemojn oficialajn. Estas kelkaj lingvaj eraroj kaj svarmo da tajperaroj. Pri ĉio ĉi kompreneble la aŭtoro ne respondecas.


Gravas, ke la eŭropa intelektularo alkiutimiĝu al la disvastigo de siaj verkoj en nia lingvo. Do, tiuj kiuj volas precize ekscii kiel fartas la universitata filozofio en Litovio, nepre legu tiun ĉi dulingvan libreton.

Eugenio de Zilah

Auld majstre verkis kaj majstre deklamis

La infana raso. William Auld.

Deklamas la aŭtoro. La Chaux-de-Fonds: LF-koop. 2007. 12cm. ISBN 3906595196. Du kompaktdiskoj kaj libreto kun la teksto de la fama poemego. Prezo: € 35,40



Iu kritikisto iam asertis, ke poeto neniam devas publike deklami siajn proprajn versaĵojn. Ĝis nun mi emis konsenti pri tiu opinio, ĉar en pluraj okazoj mi aŭdis tiajn recitaĵojn fare de poetoj, kaj tiu sperto difektis por mi la plezuron, kiun mi antaŭe sentis kiam mi silente legis la koncernajn poemojn. Tamen poezio estas verkita precipe por deklami, do mi aŭskultis kun intereso ĉi tiun duoblan diskan registraĵon, kaj poste devis modifi mian negativan sintenon.

William Auld ne nur majstre verkis; li ankaŭ majstre deklamis. Lia agrabla sudskota voĉo tre klare kaj esprime vivigas por ni la mutan presitan tekston de lia plej longa poezia verko *La infana raso*. Ĉiuj silaboj estas klare elparolataj kaj Auld ne provas histrioni, kiel (laŭ mia sperto) ofte faras aliaj verkistoj.

Ju pli oni legas aŭ aŭskultas tiun eposan verkon, oni pli kaj pli konvinkiga, ke ĝi estas gravega kontribuo al la monda literaturo. La temo estas universala, nome la situacio de la homaro en la tempo kaj en la kosmo. Ĝi estis parte inspirita de la verko *Cantos* de la usona poeto Ezra Pound, kaj ĝi memorigas min pri *Canto General* de la ĉiliano Pablo Neruda. Ofte grandaj mensoj simile pensas.

Oni povas demandi sin, ĉu bona poezio bezonas muzikan akompanion. Certe la antikvaj bardoj ofte ludis muzikinstrumentojn dum recitado. Ni scias ke la vorto liriko

originale signifis (vidu PIV-on) "Poezio, kiun oni kantis kun akompano de liro". Ĉe ĉi tiu registraĵo, la muzika akompanaĵo estas ĝenerale bela, sed laŭ mi (kaj tio estas nur mia persona opinio), la melodioj elektitaj ne ĉiam estas en akordo kun la koncerna kanto (aŭ ĉapitro kiel Auld preferis nomi la sekciojn). Ekzemple, kvankam la *Arioso* de J. S. Bach estas belega melodio, ĉu ĝi vere taŭgas por akompani la

Duan Kanton, kiu estas severa kritiko de la religio? Aŭ ĉu la *Pathétique* de Beethoven harmonias kun Kanto (la 17-a), kiu komenciĝas: "Mi estas l' araneo kaj la muŝo"? Tion mi dubas. Plie, mi sentis, ke la erotika Kvina Kanto elvokas ion pli pasian ol la dolĉa, iom sentimentala muziko, kiu akompanas ĝin. Aliflanke, la cetera elekto estas pli kontentiga, kaj plurfoje sufiĉe inspira. Ne ĉiam estis elektitaj klasikaj melodioj. Aliaj akompanaĵoj devenas de film-muziko, ekzemple la temo de *La listo de Sandler*, kiam koncentretoj estas menciitaj (Kanto 16). Tre taŭga sonas *Also sprach Zarathustra* de Richard Strauss (tem-muziko de la filmo 2001), kiel akompano de la Kvara Kanto: "Ni pioniraj homoj de la spacvojoj".

La libreto kiu akompanas la diskojn enhavas la tutan tekston kaj notojn de *La infana raso*. Ĝi estas ilustrita per allogaj grafikoj. Mi trovis nur unu eblan etan komposteraron, nome *rego* anstataŭ *rego* sur la paĝo 35 (kiu ne ŝanĝas la sencon).

Mi iom amuziĝis pri la fakto, ke Auld decidis en sia deklamado de la *Copa de Vergilio* (Kanto 190) reveni al la pruda, kaj – kiel li konfesis en sia tria eldono – erara traduko de la latinaĵo *inguen* – kiel "ventro". Oni neniam povus rigardi lin kiel prudulon!

Oni devas varme gratuli la respondeculojn pri tiu iniciato, kiu certe estos bonvenigita de la esperantistaro. Ĝi certe valoras.

Garbhan MacAoidh

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Actualité de la pensée et de l'œuvre du docteur Zamenhof. Henri Masson. s.l: s.e, 2009. 12p. 21cm. Franclingva. Ĉu la ideoj per kiuj famiĝis la iniciatinto de Esperanto ankoraŭ validas jarcenton post lia morto? € 1,50

Beatrijs. El la nederlanda trad. G. Berveling. Zwolle: VoKo, 2010 (2-a eld). 48p. 21cm. Mezepoka nederlanda legendo. € 9,00

Crusoes in Siberia. The Fairest Judgment. Tivadar Soros. Antaŭparoloj de Paul Soros kaj George Soros. En la anglan trad. H. Tonkin. New York: Mondial, 2010. 93p. 23cm. Bind. Kromkovrilo. Ilus. ISBN 9781595691828. Anglalingvaj versioj de *Modernaj Robinzonoj* kaj *La plej justa juĝo*. € 24,00

Ĉu sekso subfosas? Paŭlo Popo. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 80p. 21cm. ISBN 9782918300410. Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malmuntado de seksa identeco. € 7,50

Desegnante la parkon. Miriam Rodríguez. Desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez. El la hispana trad. J. de Jesús Campos Pacheco. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 48p. 15cm. ISBN

9782918300236. En tiu ĉi libreto malmulte da teksto akompanas la desegnaĵojn, kiuj atendas kolorigontojn. € 3,90

Esperanta versado. Jaroslav Krolupper. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2011. 55p. 17cm. ISBN 9788087169223. Sonetoj, rondeloj, pantunoj, *rispetoj*, tercinoj kaj aliaj rimajoj. € 4,20

Esperanto est-il une langue agglutinante?, L'. Jean-Claude Caraco. S.l., s.e., 1993. 9p. 21cm. Franclingva. Antaŭ ol difini la tipon de lingvo estus saĝe difini la terminologion. € 0,90

Esperanto-identeco: citaĵoj kaj komentoj. Anatolo Gončarov. Thaumiers: La KancerKliniko, 2010. 24p. 30cm. Suplemento al *La Kancerkliniko*. ISSN 03985822. Okdeko da citaĵoj, kelkaj kun raŭmisme orientitaj komentoj. € 5,40

Esperanto-movado en Gunma / Gunmano esuperanto undou. 1906-2010. Maebasi-si: Horizonte, 2010. 174p. 27cm. Ilus. ISBN 9784939088113. Plejparte japanlingva. € 5,40

Esperanto n'est pas européen, L'. Claude Piron. S.l., s.e., s.j. 7p. 21cm. Franclingva. La aŭtoro provas montri ke Esperanto estas malpli eŭropa ol ĝi aspektas unuavide. € 0,90




Esperanto – ¿Una cura para las heridas de Babel? A. Battig, R. Sartor. Buenos Aires: deauno.com, 2010. 147p. 21cm. Hispanlingva. ISBN 9789871581771. "Ĉi tiu libro povas malfermi la menson al nekonata realaĵo". € 6,90




Ĝenerala Asembleo, La. João José Santos. Estremoz: La Karavelo, 2010. 42p. 21cm. ISBN 9789899631236. Unuakta tragikomedio kun Esperanta fono. € 13,20

Hillel, un sage du premier siècle avant notre ère / Le hillélisme et l'phomaranisme du docteur L.L. Zamenhof. André Cherpillod. S.l.: La aŭtoro, [2005]. 21p. 21cm. Franclingva. Konciza prezento de la fondinto de juda skolo, kies influo daŭris jarcentojn kaj de la rilato inter lia pensado kaj la hilelismo kaj homaranismo de L.L. Zamenhof. € 2,10

Kantoj de milito. Kompilis Boris A. Zozulja. Precipe el la rusa trad. div. Rostov-na-Donu: Verda Kukolo, 2010. 38p. 30cm. La tekstoj de 17 tradukitaj kantoj, plejparte kun muziknotoj. € 8,70



Kien Afriko en la 21-a jarcento? Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 157p.



21cm. ISBN 9782918300397. Preskaŭ 40 mallongaj kontribuajoj rilataj al diversaj temoj ligitaj al la nigra kontinento. € 14,10

Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koçabambo. Alexis Passadakis, Hendrik Sander, Hans-Jörg Schimmel, Karl Hermann Tjaden k.a. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 75p. 21cm. ISBN 9782928300311. Ĉu "ekologia socialismo" povas savi nin el la klimatkatastrofo al kiu ni direktiĝas? € 7,50

Komunistaj star-kaj disput-punktoj. Roberto Ŝteĝervaldo. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 151p. 21cm. ISBN 9782918300403. Samkiel la esperantistoj, ankaŭ la marksistoj disputas inter si. La aŭtoro prezentas siajn vidpunktojn, ofte surprizajn. € 9,90

Kontribuajoj al la kritiko de la hegela

jurfilozofio – Enkonduko. Kontribuajoj al la kritiko de la politika ekonomio – Antaŭparolo. Karlo Markso. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 36p. 21cm. Kun aldona teksto de Jozefo Ŝlejŝtejno. ISBN 9782918300380. Tekstoj verkitaj en 1843-4, respektive 1859. € 7,50

Kumewawa – Iben il-Ĝungla. Tibor Sekelj. En la maltna trad. K. Mallia. Rabat: Wise Owl, 2010. 72p. 21cm. Ilus. ISBN 9789993297055. Maltalingva versio de *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*. € 9,30

Pourquoi je crois en l'espéranto. Claude Piron. s.l., s.e., [2001]. 7p. 21cm. Franclingva. Teksto de parolado farita kadre de la Internacia Junulara Kongreso, Strasburgo, 2001. € 0,90

Premier manuel de la langue auxiliaire esperanto. Courgenard: André Cherpillod, s.j. 43p. 21cm. Faksimila represo de lernolibro por franclingvanoj tre populara antaŭ unu jarcento. € 3,00

Slownik biograficzny esperantistów polskich. Józef Golec. Cieszyn: La aŭtoro, 2010. 276p. 21cm. Pollingva. 177 biografioj de polaj esperantistoj, plejparte kun portretoj kaj aŭtografoj. € 12,30

Stempe esperanckie Poczty Polskiej. Józef Golec. Sopot: La aŭtoro, 2009. 42p. 21cm. Pollingva. Ilustrita katalogo de porokazaj E-stampoj uzitaj de la pola poŝto (1931-2009), kun koncizaj klarigoj. € 3,00

Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo. Kritiko de la Wertkritik. Jürgen Albohn. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 29p. 21cm. ISBN 9782918300427. Kritiko de... valorkritiko. € 3,90

Verda tritiko, La. Colette. El la franca trad. R. Imbert. Durdevac: Grafokom, 2010. 98p. 21cm. ISBN 9789539697578. Romano pri la seksa kaj senta inico de du parizaj geadoleskantoj. € 8,70

Klerigu kaj kleriĝu!

Por la naŭa fojo en la Universala Kongreso estos Kleriga Tago; ĝi okazos lundon la 25-an de julio. Proponoj por partoprenigaj programeroj, podiaj diskutoj, aktivigaj laborgrupoj, kiuj rilatas ekzemple al la movado, lingvoj, kulturoj, informado, organizado, aŭ prelegoj pri nekutimaj temoj, estas bonvenaj ĉe Claude Nourmont, vicprezidanto kaj estrarano pri edukado, kulturo, kongresoj: moonmont@pt.lu.

Nova ILEI-sekretario

Post la neatendita demisio de nia sekretario antaŭ kelkaj tagoj, ILEI anoncas novan agantan sekretario: s-ino Ida HAVASI, Puskin u. 1/1, HU-2000 Szentendre, Hungario; idahavasi@freemail.hu. Bv. sendi komunikojn (demandojn, membro-deklarojn, raportojn, dokumentojn...) al Ida, kaj kopie al la prezidanto (stefan.macgill@gmail.com), kiu zorgas pri la enkonduko de Ida en la laboron.




Navige tra TTT-paĝoj



Reta Vortaro

<http://www.reta-vortaro.de/>


La plej rekomendinda reta vortaro, almenaŭ ĝis la apero de Reta PIV.



Rata Vortaro

<http://esperanto-jeunes.org/ravo/ravo.html>

Listo de rimoj ellaborita el la Reta Vortaro.



Traperko

<http://www.traperko.net/>

Tradukilo inter 30 lingvoj kun Esperanto kiel pontlingvo.

Marek Blahuš



Prezoj en eŭroj.

DUMVIVAJ MEMBROJ:

Usono: F. Montenegro-Rodas.

SOCIETO ZAMENHOF:

Argentino: R. Calógero. Aŭstralio: J. Bishop. Aŭstrio: S. Stamm. Belgio: M. Cwik, G. Maertens, M. -L. Vanherk, K. Tytgat. Bosnio kaj Hercegovino: S. Milojević. Brazilo: F.J.P. Maia, A.S. Santos. Britio: G. Sutton, E.R. Waterworth, J. Wells. Danio: T. Bak, A. Birkbak, A. Casper-Mortensen, T. Gregers, Else & Ejnar Hjorth, K. Jørgensen, S.F. Jørgensen, E. Kehlet, E. Mortensen, E.H. Olsen, B. Trærup. Finnlando: A. Harju, H. Laine, S. Mattlin, S. Mynttinen, R. Pyhälä, V. Tikkanen, H. Tuomola. Francio: A. Albault, A. Andrieu, Sylviane & Henri Lafargue, Denise & André Loisel, G. Thomas. Germanio: E. Blasius, W. Bormann, H. Erhard, H. Klünder, Gisela & Georg Macioszek, A. Putze, M. Scherm, I. Tautorat, C. Trésorier. Hispanio: J. Franquesa, L. Hernández, R. Urueña. Hungario: P.P. Denke. Israelo: J. Ŝemer. Italio: M. Lipari. Japanio: J. Akada, K. Deguti, Ĉieko & Hirokaz Doi, H. Fukumoto, K. Hosomi, Y. Itou, K. Kikusima, Y. Kuroyanagi, S. Kuzume, G. Pompilio, N. Sakurai, S. Simada, K. Simizu, Keiko & Nobuyuki Syōzi. Kanado: B. Crisp, S. Norvell. Kroatio: B. Čović. Litovio: P. Jegorovas. Luksemburgo: B. Moon, C. Nourmont. Nederlando: W. Akkerman, Ans & Hans Bakker, G.A.M. Van Bergeijk, L. Demmendaal, P. Engwirda, E.C. Klaver, M. v/d Horst-Kolińska, M. Massar-van Diepen, J. Moonen, N. Overwater, G. Peet, S. Smits. Norvegio: D. Draper, Eli & Agnar Fitjar, C. Fossen, Gunilla & Tomas Jansson, T. Kvakland. Rumanio: A.B. Sabolciu-Sighismund. Svedio: M. Häggström, L. Holmlund, U. Luin. Usono: U. Becker, J. Edwards, Lucy & Bill Harmon, B.A. Sherwood, D. Simpson, H. Tonkin, M. Whitmore.

PATRONOJ DE TEJO: Argentino: R. Calógero. Aŭstralio: J. Bishop. Belgio: G. Maertens, A. Mechelynck. Brazilo: M. das Dorez Barcellos, M. Goes Alves da Silva, N.P. Mendes. Britio: M.H. McClelland. Finnlando: K. Hautamäki, A. Karkiainen, A. Kytä, M. Laamanen, S. Mynttinen, T. Oittinen, R. Pyhälä, A. Ritamäki, P. Saarinen. Francio: A. Léonard. Germanio: U. Bociort, Gisela & Georg Macioszek, F. Reisel, I. Tautorat. Hungario: F. Szabó-Felső. Israelo: J. Tilleman. Italio: G. Polerani. Japanio: H. Fukumoto, K. Hosomi, K. Kai, S. Simada. Kanado: M. Fettes. Nederlando: M. Massar-van Diepen, F.J. Pieterse-Kruger. Norvegio: D. Draper. Pollando: M. Żak. Rusio: O. Izjumenko.

DONACOJ ĝis la 15-a de februaro 2011:

Konto Afriko: Finnlando: A.-L. Ali-Simola 10,00. Nederlando: C. & R. Bossong 50,00. Slovakio: J. Reinvar 25,00. Svedio: J. Hammarberg 22,42. **Fondaĵo Hans:** 1900,00 (Kongo). *Sumo ĉi-jara:* 2007,42.

Fondaĵo Ameriko: Kostariko: H. Mora 9,52. Usono: P.

Browne, M. Kennedy – po 36,56; B. Neifert 7,35; J. Spickler 11,12; J. Wright 14,82. *Sumo ĉi-jara:* 115,93.

Fondaĵo Azio: Japanio: J. Akada 178,69; M. Inada, M. Osioka, Z. Sibayama, S. Yamamoto, T. Yamasita – po 17,83; N. Isogai, M. Iwai, E. Kimura, T. Konisi, J. Oshima, R. Sasako, M. Yasumura – po 17,86. Kanado: Y. Komori 50,00. Slovakio: J. Reinvar 25,00. *Sumo ĉi-jara:* 467,86.

Fondaĵo Canuto: Danio: E.H. Olsen 61,00. Finnlando: A. Kuhanen 200,00. Germanio: Gisela & Georg Macioszek – po 17,00. Hispanio: J. del Barrio 50,00. Israelo: J. Ŝemer 50,00. Nederlando: L. Demmendaal 300,00. Svedio: Norrköpings E-Klubb 165,36. Usono: E.J. Lieberman 40,09. *Sumo ĉi-jara:* 900,45.

Konto Espero: Japanio: M. Osioka (Haitio). 17,83. Slovakio: J. Reinvar 25,00. *Sumo ĉi-jara:* 42,83.

Konto Oficeja ilaro: Brazilo: H.S.B. Knoedt 47,62. *Sumo ĉi-jara:* 47,62.

Ĝenerala kaso: Hispanio: CMF 100,00. Svislando: H. Strasser 33,48. Usono: B. Neifert 7,35. *Sumo ĉi-jara:* 140,83.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

Ĉi-jare pasas 500 jaroj de post la apero de *Laŭdo de l'stulteco* de Erasmo de Roterdamo

MALFERMA TAGO

sabaton la 14-an de majo 2011 (10h00-17h00)



★ Věra Barandovská-Frank prelegos pri *Erasmo* kaj Gerrit Berveling pri *Laŭdo de l'stulteco*

★ E-filmoj montrataj

★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%

★ Specialaj ofertoj

★ Senkosta loterio

★ Bazaro de esperantaĵoj

★ Kafo kaj teo senpagaj

Loko: CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo

Interlingvistika sesio kaj instruista trejnado en Poznań pasis en bona etoso



Foto: Katalin Kováts kaj Zbigniew Kornicky

La kuna okazigo de la unujara instruista trejnado de UAM kaj ILEI kunlabore kun edukado.net kaj de la tradiciaj interlingvistikaj sesioj en la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano (Pollando) pruviĝas bona solvo.

La 11 personoj (po 3 el Pollando kaj Hungario, 2 el Francio, po unu el Slovakio, Belgio kaj Germanio), kiuj komencis la trejnadon en septembro, ĉiuj renkontiĝis en februaro dum la dua sesio post diligenta semestra laboro hejme. Inter ili estas 4 stipendiatoj de ILEI-UEA kaj 2 polaj gejunuloj de PEA.

La metodikan programon gvidis Katalin Kováts, motoro de edukado.net, trejnante la kursanojn pri taktikoj de praktika instruado. La partoprenantoj jam antaŭe hejme entuziasme pretiĝis al la konsultiĝo; kreis ekzercojn, horplanojn kaj recenzojn. Surloke ili spektis kaj analizis filmitajn lecionojn, trapasis ekzamenon, prezentis siajn "instruistajn kofrojn" kaj kvaronhoran provinstruadon, fine estis testataj pri instruado de tiklaj gramatikaĵoj. Zsófia Kóródy, ILEI-estrarano, enkondukis ilin al internaciaj kunlaborebloj en Eŭropo, Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, traktis la lernfaciligan rolon de Esperanto. Literaturan minikurson gvidis Tomasz Chmielik.

La aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj kompletigis la studprogramon: Ziko van Dijk prelegis pri nuntempaj problemoj de la E-movado, ankaŭ pri la rolo de Zamenhof en la frua movado. La partoprenantoj de la universitata programo sekvis la okupojn de la traduka specialiĝo: teorion kaj praktikon de tradukado kaj interpretado kun Ilona Koutny; beletran tradukadon kun Tomasz Chmielik; tradukadon de novaĵoj kun Barbara Pietrzak, kies nomo

ligiĝis al la Pola Radio. La novaĵo pri la ĉesigo eĉ de podkasto de la Esperantaj elsendoj alvenis kiel ŝoko.

Merkrede du partoprenantoj el la pasintjara grupo, Christophe Chazarein el Francio kaj Przemysław Wierzbowski el Pollando, prezentis sian finlaboraĵon (pri lernmotivoj en lernu.net: <http://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=120>, resp. pri elstaraj personecoj de E-instruado: <http://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=11>), kaj sukcese trapasis la finan ekzamenon. Gratulojn kaj sukcesojn en la instruista laboro!

La merkreda komuna vespero denove kunigis la partoprenantojn, instruistojn kaj lokajn esperantistojn en bona etoso. Ni kune festis la novdiplomitojn kaj Katalin, kiu merite iĝis "Esperantisto de la jaro 2010" laŭ *La Ondo de Esperanto* (<http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/196-lode.htm#196-01>). Semajnfine la restintaj partoprenintoj vizitis la renesancan kastelon de Kórnik (proksime al Poznano). Bedaŭrinde, la spertinterŝanĝojn kompletigis ankaŭ interŝanĝo de diversnaciaj grip-virusoj – kio en si mem unuigis la grupon kaj lasis en la membroj profundajn memoraĵojn.

Septembre sekvos la finekzamenoj por la instruista grupo kaj ankaŭ por la universitata grupo. Denove finiĝos 3-jara kursaro kun malmultaj persistuloj. ESF daŭre subtenas la studojn per stipendioj.

Unua sesio: 17-21.09.2011. Dum la sama semajno okazos denove Interlingvistika Simpozio (22-23.09) ĵus antaŭ Arkones.

Ilona Koutny

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

Katalin Kováts, edukado.net

<http://www.edukado.net/novajhoj>

Rotarianoj kaj la interkompreniĝo

La 1-an de februaro 2011 okazis oficiala lanĉo de la nova retpaĝaro de la esperantistaj rotarianoj www.radesperanto.org.

La grupo RADE, Rotaria Amikaro De Esperanto, konsistas el rotarianoj, kiuj apogas kaj aktive uzas la internacian lingvon. Ĝi celas realigi la idealojn de Rotario Internacia por interkompreno, amikeco kaj paco inter la nacioj, faciligi la personajn kontaktojn inter rotarianoj de malsama lingvo-deveno kaj kunlabori en la internaciaj servoj de Rotario Internacia. Nuntempe granda parto de la rotarianoj loĝas ekster la regionoj de la angla lingvo, la oficiala lingvo de Rotario Internacia, kiu havas siajn klubojn en 168 landoj de la mondo.

Februaro estas en Rotario la monato, dediĉita al tutmonda interkompreniĝo. Tial oni elektis ĉi tiun



monaton por aperigi la plej novajn (kaj taŭgajn) informojn pri la internacia komunikado en Rotario, kaj pri ĝia solvo pere de Esperanto.

La retpaĝaro estas rezulto de la kunlaboro inter

rotarianoj, rotaraktanoj¹ kaj apogantoj de ambaŭ idealoj el malsamaj landoj, kiuj ankaŭ pere de Interreto uzas Esperanton kiel ponto-lingvon por la traduko de la

informoj al pluraj naciaj lingvoj. Oni celas daŭre pligrandigi la nombron de la lingvoj.

La grupo esperas, ke la retpaĝaro estos utila por la analizado de la lingvaj problemoj, kiujn Rotario alfrontas, ke tie la Esperanto-parolantoj povos ricevi informojn pri Rotario Internacia, kaj precipe ke la rotarianaro ricevos informojn pri la internacia lingvo Esperanto kaj ĝiaj agadoj ene de la rotaria mondo.

1) Junulara movado de Rotario.

RADE-teamo

Alispeca vojaĝo en Israelo

En la februara n-ro de la prestiĝa kultura kaj mondvojaĝa magazino *Masa Aher* (hebree "Alispeca vojaĝo"), aperis 5-paĝa, tre favora artikolo pri Esperanto el la plumo de israela ĵurnalisto loĝanta en Svedio.

La artikolo estas riĉe ilustrita, i.a. per fotoj de la UK-oj en Havano kaj Bjalistoko. Aldone al abundo da faktoj pri la lingvo, ĝi intervjuas esperantistojn el Svedio, Kanado, Israelo kaj Aŭstralio.

La artikolo konstatas ke "Esperanto ekzistas pli ol cent jarojn kaj ĝi daŭre evoluas. Ĝiaj parolantoj estas disigitaj en ĉiuj anguloj de la terglobo, ili estas ege aktivaj kaj produktas gazetojn, muzikon kaj teatraĵojn. Ili havas naciajn kaj

internaciajn organizaĵojn kaj ili renkontiĝas en sennombraj renkontiĝoj tutmonde".

Ĝia konkluda alineo diras: "Esperanto estas kiel lingva manpremo: du personoj etendas siajn manojn je duono de la distanco inter si, farante egalan penon kompreni unu la alian. Esence Esperanto estas reala ilo por egaleco kaj kunekzisto, precize kiel Zamenhof mem priskribis la unuan E-kongreson: "ne renkontiĝis ĉi tie francoj kun angloj, rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj".

La artikolo aperis en bona koincido kun la baldaŭa Internacia Libro-foiro de Jerusalemo (20-25.2), kie ELI havos budon pri E-libroj kaj muziko, kaj prezentos i.a. la novan duoblan KD-on de ELI *Kanti gefratoj kune*.

Amri Wandel, Prezidanto de ELI



Loke – fake – persone



● **NEDERLANDO:** de la 3-a ĝis la 30-a de aprilo 2011 okazos en "Marisdomo", la ateliermuzeo de Heumen (10 km sude de Nijmegen, tuj apud la aŭtoŝoseo A73) arta ekspozicio de Alise Medina, fama latva artistino 27-jara, denaska esperantistino, filino de la konata esperantisto Aristids Mediš. Sub la titolo "Fabeloj por plenkreskuloj" ŝi en siaj pentraĵoj akcentas detaletojn de la ĉiutaga vivo kiel naturajn ripozlokojn por la homo. Ŝi gajnis la 1-an premion de "Gallery Global Art 2010", la konkurso por junaj artistoj el la baltaj ŝtatoj, kaj estas "la plej bona junartista de la Balto de 2010"! La muzeo estas malferma merkrede 14:00 – 17:00, sabate kaj dimanĉe 13:00 – 17:00, krome laŭ interkonsento: ☎ 024-3580320, ✉ k.ruig@hotmail.nl. La retejoj de Alise kaj la muzeo: www.alisemedina.blogspot.com kaj www.marishuis.nl. Venu, renkontu la artistinon persone, kaj kuntrinku glaseton je ŝia sukceso en Nederlando kaj Esperantujo!

Kees Ruig

● **BULGARIO:** Bulgara Esperanto-Asocio anoncas internacian Esperantan literaturan konkurson "Hristo Gorov – Hrima", en kiu povas partopreni verkistoj, poetoj kaj ĵurnalistoj el ĉiuj landoj. La konkurso havos la branĉojn poezio, prozo kaj artikolo. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkitaj en Esperanto. La noveloj ampleksu ĝis 4 paĝojn, aŭtoro rajtas partopreni per unu novelo, originale verkitaj en Esperanto.


● **BRAZILIO (Bel-Horizonto):** Instigitaj de pli fruaj diskutoj kaj gazetaraj atakoj al Esperanto, 14 homoj el 7 brazilaj urboj vojaĝis al la provinco Minas Gerais (samgranda kiel Francio) por partopreni sendependan E-Renkontiĝon. Kelkaj vojaĝis pli ol mil kilometrojn, pro la grandeco de la lando. La 7-an kaj 8-an de januaro ili prezentis proponojn kaj diskutis laborplanon por antaŭenigi E-on kaj provi bremsi la konstantan malkreskon de esperantistoj en la lando. La kunveno okazis en la sama ĉambro kie kelkaj el ili eklernis la lingvon antaŭ 40 jaroj. La ĉefaj diskutoj kaj la fina laborplano koncentriĝis al 3 niveloj: 1. (Re)organizado de la esperantista movado; 2. Instruado de E-o kaj trejnado de E-instruistoj (prefere per distanca instruado); 3. Formoj disvastigi Esperanton (informado). Tre bedaŭrinde, kiel ĉiam en Brazilo, montriĝis ke kelkaj ne povas klare distingi inter E-o kaj religia movado. Surbaze de la diversaj proponoj, la partoprenantoj skizis laborplanon, kaj ĉiuj prenis sur sin la respondecon plenumi eron de tiu landa agadplano. Túlio Flores kunordigis la tutan aranĝon kaj redaktadon de la fina dokumento.

Roberto Resende

● **MOZAIKO:** Clelia, juna franca poetino kaj pentristino, iam aŭdis pri Esperanto. Ĉar ŝi estas tre idealisma, ŝi verkis romanon pri la infanaĝo kaj deziras konigi ĝin al homoj ne scipovantaj la francan. Ŝi vidas en nia lingvo taŭgan rimedon por konigi sian romaneton al

multaj homoj diverslandaj. Clelia lernis Esperanton tiucele ĉe Daniel Luez, kaj presigis (proprakoste) tiun ĉarman verketon. La romano *Mozaiko* prezentas junan knabon Forbub', kiu vivas sub la influo de du virinoj: la patrino, kiu tute ne komprenas lin, kaj ĉarma junulino Luna, kiu estas por li kvazaŭ feino kaj helpas lin. La influo de Luna helpas lin pasi de la infanaĝo al la adolta vivo. Pliaj informoj ĉe

daniel.luez@orange.fr



● **DASGUPTA:** la librofoiro de Kolkato estas unu el la plej grandaj librovendejaroj en la mondo. Kolkato estas ege legema aŭ almenaŭ libroaĉetema urbo. Probal Dasgupta aperis tie ĉi-jare (25 jan – 04 feb), ĉar tiam aperis lia libro en la bengala "Ornaminte la boaton per ŝiritaj vortoj". Tiu 290-paĝa kolekto de 16 eseoj, kun kursivtipara konekta fadenteksto tra la tuta verko, estas duone lingvistika, duone filozofia-literatura-socia, kaj forte montrofenestras Esperanton, s-ron Sinha, la esperantologion, la uzendecon de Esperanto por seriozaj lingvistoj almenaŭ kiel laborilo, la ligo inter Esperanto kaj la pontofaraj laboriloj de la substancisma lingvistika skolo kiun li reliefigadas, kaj tiel plu. Dasgupta estis ĉe la stando de la eldonejo Gangchil, kiu aperigis la libron kaj volas konatigi lin kun la legantaro. Temas pri prestiĝa eldonejo, kiu iĝis konata pro siaj seriozaj titoloj en la lastaj jaroj.




SPECIALA OFERTO DE STAFETAĴOJ



La arbo de la sciado. Pío Baroja. El la hispana trad. Fernando de Diego. Filozofia romano pri la sopiro al homa perfektigo: amara, melankolia, sed trankvila. La Laguna: J. Régulo, 1973. 222p. 22cm.

Senĝenaj dialogoj. Alberto Fernández. Facilaj klarigoj pri natursciencaj fenomenoj per dialogoj. Originale verkita en Esperanto. La Laguna: J. Régulo, 1971. 197p. 22cm.




Bona ŝanco. Werner Bormann. Pri diversaj facetoj de la Esperantomovado. La Laguna: J. Régulo, 1971. 246p. 22cm.

Martín Fierro. José Hernández. El la hispana trad. Ernesto Sonnenfeld. La nacia eposo de Argentino. Pri la sorto de la gaŭĉoj. La Laguna: J. Régulo, 1965. 289p. 21cm.



Soifo. Lajos Tárkony. Plena poemaro de unu el la gravaj Esperanto-poetoj. Sonora riĉo, lingva kaj forma. La Laguna: J. Régulo, 1964. 231p. 22cm.

Homoj sur la tero. Stellan Engholm. Premiita romano originale verkita en Esperanto. Historio de sveda kampara familio dum tri generacioj. La Laguna: J. Régulo, 1963. 235p. 23cm.



Reĝo Edipo kaj Antigona. Sofoklo. El la antikva greka trad. D.B. Gregor. Eleganta traduko de du klasikaj tragedioj, ege influintaj la eŭropan kulturon, form- kaj enhavfidela. La Laguna: J. Régulo, 1960. 216p. 22cm.

Topaze kaj La ŝipego "Tenacity". Marcel Pagnol, Charles Vildrac. El la franca Roger Bernard. La unua komedio pritraktas satire la valoron de la honesto en burĝa socio kaj la dua, la vivon kaj la sentojn de havena laboristaro. La Laguna: J. Régulo, 1960. 292p. 22cm.




Ĉe la Libroservo de UEA, prezo/ekz.: €6,00. Triona rabato por ajna kombino de minimume tri libroj, identaj aŭ ne. Oferto valida ĝis la 30-a de aprilo 2011. Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. +31 10 436 1044. Fakso: +31 10 436 1751. Retpoŝto: libroservo@co.uea.org.

FURORAĴOJ PASINTJARAJ

La arto labori kune. Red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. Panorama kolekto de diverstemaj artikoloj de 106 aŭtoroj, eldonita okaze de la 70-a datreveno de unu el la plej elstaraj esperantistoj de la lastaj jardekoj. Rotterdam: UEA, 2010. 901p. 26cm. Bind. Ilus. ISBN 9789290171133. €60,00.




Vojaĝo en Esperanto-lando. Boris Kolker. Krestomatia gvidlibro al la Esperanta kulturo kun ekzercoj, pormemlerno aŭ grupo. Rotterdam: UEA, 2005 (3-a eld.). 280p. 24cm. Ilus. ISBN 9290170883. €18,00.




Lingvokajmenso. Noam Chomsky. El la anga trad. Edmund Grimley Evans. Kolekto de eseoj okupiĝantaj pri lingvosciencaj kontribuoj al studado de la menso, formo kaj signifo en naturaj lingvoj, naturo de la lingvo, lingvoscienco kaj filozofio, biolingvistiko. Rotterdam: UEA, 2010. 188p. 21cm. ISBN 9789290171140. €9,90.

La lastaj tagoj de Ada Aduŝka. Gian Carlo Fighiera. La lastaj monatoj de Ada Fighiera-Sikorska, priskribitaj de ŝia edzo. Rotterdam: UEA, 2010 (3-a eld.). 32p. 21cm. ISBN 9789290170945. €2,40.



Ĉu vi parolas tendare? Renato Corsetti, Mauro La Torre. Perbilda kurso por junuloj. Rotterdam: TEJO, 1992 (4-a eld.). 95p. 20cm. €4,80.



Saluton! Audrey Childs-Mee. Rektmetoda lernolibro por memlernantoj, sed taŭga ankaŭ por kursoj. Rotterdam: UEA, 2002 (7-a eld.). 194+40p. 21cm. Ilus. ISBN 9290170506. €10,80.



Kunci Esperanto. Kompilis Heidi Goes kaj Bobby Mulyadi. Nova, moderna ŝlosilo indonezia kun Esperanto-indonezia vortlisto. Rotterdam: UEA, 2009. 48p. 15cm. ISBN 9789290171119. €1,20.

Esperanto Sleutel. Modernigita ŝlosilo por nederlandlingvanoj, kun skiza gramatiko kaj listo de 1500 bazaj vortoj. Esperanto Nederland, 2006 (represo). 47p. 15cm. ISBN 9789080322646. €0,90.



Ĉe la Libroservo de UEA, triona rabato ekde tri ekzempleroj de la sama titolo.